

ASISTILO

n-ro 20**Somero 1997 Eté**

Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) / Religi-kompara revuo
 Association Internationale d'Etude des Enseignements Spirituels et Théologiques

ASISTI : Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj

Neŭtrala asocio kunlaboranta kun TEL (Tutmonda Ekumena Ligo), JBLE (Japana Budhana Ligo Esperantista), EPA (Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto), UEA, UEA (Ŭon-budhisma Esperantista Asocio), OKEJ (Ortodoksa Klubo de Esperantaj Judoj). **Membro de WCRP** (Monda Konferenco pri Religio kaj Paco), asociita membro de IARF (*International Association for Religious Freedom* / Internacia Asocio por Religia Libereco).




Hindua templo en Utarpradeŝa vilaĝo, fotita de nia "*speciala sendito*" al Bharato **Claude Rouget**, eksa *VERDire*-Red. (N)



WCRP, "*the World Conference on Religion and Peace*", la plej grava el la tutmondaj interreligiaj organizoj, akceptis ASISTI kiel *institucian membron* en januaro.

Jerusalemo, kie okazos la 4-a *Interreligia Seminario Esperantista*, venontan printempon



Vorto de la redaktoro

Historia decido por ASISTI (kaj eĉ Esperanto): WCRP, la *Monda Konferenco pri Religio kaj Paco*, akceptis ĝin kiel "institucian membron". Eble tiel estos alirebla por ASISTI (kaj, ankaŭ pere de *Ŭonbuddismo*, por Esperanto) la probable baldaŭ starigota *Unuiĝinta Religiaro* (laŭ la UN-a modelo).

Ni varme invitas ĉiun el niaj legantoj partopreni en la 4-a *Interreligia Seminario Esperantista* okazonta en Jerusalemo ĉ. Pasko 1998. S-ro Jeremi Gishron bonvenigos vin ...kaj viajn prelegojn, aŭ aliajn kulturajn kontribuojn !

Ankaŭ dum la ĉi-someraj IJK en Asizo (I) kaj UK en Adelajdo devis okazi interreligiaj diservoj, pri kiuj ni eble raportos en la venonta numero...

Unu plian fojon la redaktoro petas la indulgon de la fidelaj abonantoj pro sia longa prokrastado. Li verkadis nacilingvan libron, menditan de fama franca eldonisto, kiu fine rezignis. Duoble perdita tempo do : por Esperanto kaj por mi !

N.B. **Bonvolu** laŭeble **sendi viajn artikolojn** ktp. en formo de dokumentoj en *Word.6* (aŭ kongruaj : *Word Perfect...*) sur disketoj (3 1/2), plie de la surpapera kurtima formo : tiel mi ŝparos la enkomputiligan retajpadon. **Mi ankaŭ povas ricevi ilin fakse aŭ modeme.**

Ligila Organo de ASISTI (Asocio de studado internacia pri spiritaĵoj kaj teologiaj instruoj) ĉ. trimonata

Red.: Presbytere F-09800 Balagué. Tel/Faks 33 561 047 066

ASISTI-estraro: Prez. Yosimi Umeda - Bradio Moro : kasisto - Ch. Lavarenne : sekretario kaj vickasisto - Jeremi Gishron (Centro Sivron, Box 231 80, IL-91 231 Jerusalem) : kunvenoj - F. Degoul : eksteraj rilatoj - Leif Nordenstorm : Religia Antologio (Landstingsvägen 9A, S-96176 Boden, Svedio. Tel. : 0921-12354).

Directeur de Publication : Christian Lavarenne

Jarabono : triono de UEA-individua abono (*M4*), t.e. 105ff / 34gld / 30DM / 20\$ (duonpreze por malriĉaj l.) al :

- franca poŝtkonto *Asistilo*, n-ro 1042177R Marseille

- UEA-konto asis-r

- FEL-konto clvr-n

- Marek Krainski, ul. Albanska 28/2, PL-60 134 Poznań

- aŭ B. Moro, Stryka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle

Subtena abono : ekde 150 ff / 50 gld / 50 DM / 30 \$

Abonhelpa fonduso : pliaj abonoj laŭ la tarifo valida por vi mem ; vi rajtas indiki la adresojn de la ricevontoj...

ASISTI-kotizo 1997 : deviga por esti membro, kiu ajn ĝi estu (sed minimume kvarono de la UEA-MJ : 10 gld, por okcident-Eŭropo, norda Ameriko, Japanio)


Subtena membro : ekde 200ff / 70 gld / 70 DM / 40\$

...Ne forgesu kontribui, koran dankon !

Enhavo

ASISTI akceptita de la Monda Konferenco pri Religio kaj Paco (WCRP, Usono)	p. 3
<i>Iniciato por Unuiĝinta Religiaro</i> , de Joel Brozovsky (J)	p. 4
Parolado de J.P. Morton, Dekano de la Novjorka Katedralo , ĉe la Praga UK (CZ)	p. 4
Averto al la Unuiĝintaj Religioj, de Baba Virsa Singh (Bharato)	p. 5
Por ami Dion : praktikaj instruoj de Baba Virsa Singh, trad. de Majk Sadler (H)	p. 5
Senpretendaj rakontoj pri spiritaĵoj renkontoj en Bharato, de Claude Rouget (N)	p. 6
Leteroj : - de S.S. Pradhan, kun poemoj de D.V. Gundappa (Bharato)	p. 9
- Katolika respondo al la Redaktoro, de A. Zecchin kaj L. Mantaut (I)	p. 9
Ĉu teologie pravigeblas supereco de iu religio super la aliaj, de B. Westerhoff (D)	p. 10
<i>La Serio pri Gilgameŝ</i> , fino de la <i>Dua tabuleto</i> (Malnovaj kaj Nineva versioj, II-a jarmilo a.K.)	p. 13
Praga IRKE-a prelego : Jogo kaj sano, de Christian Lavarenne (F)	p. 15
Usona Ŝtat-departementa raporto pri la <i>Religia situacio en Ĉinio</i>	p. 18
Nova sekto (mis)uzas Esperanton (Mongolio)	p. 19
<i>Granda Unueca Kredo</i> , de Jebumō (Ĉinio)	p. 20
Konscienc-obĵetado (Homrajt-Komitata Komentario, kaj KEK-renkontiĝo en Minsk)	p. 21
<i>La Serĉado de l'Gralo</i> : Percevalo kaj la enermicino, fino (el la romanika, XIII-a jc)	p. 22
Paĝo sub la respondeco de <i>Centro Sivron</i> (Israelo)	p. 25
Fine (?) pri <i>Amikaro Bruno Gröning</i> , de F. Degoul kaj Ronald C. Peries (Ŝrilanko)	p. 26
<i>La tri kribriloj</i> (greka apologo)	p. 26
Letero : Atesto pri alispeca resaniĝo, de Argelio Guadarrama Corrales (Kubo)	p. 27
<i>Taŭhid</i> : Unueco kaj Unikeco de la Kreinto, de Muhammad Kahraman (Turkio)	p. 28
Taksado de Esperanto fare de islama filozofo (Alĝerio)	p. 30
Invito kaj aliĝilo por la 4-a Interreligia Seminario Esperantista , en Jerusalemo	p. 32

ASISTI akceptita de WCRP



La *Monda Konferenco pri Religio kaj Paco* (angle mallongigite WCRP) ĵus akceptis ASISTI kiel "institucian membron" (*institutional member*), sekve de 3-jara klopodado. WCRP, kies sidejo estas ĉe UNO, 777 United Nations Plaza, en Nov-Jorko, estas **la plej grava el la tutmondaj interreligiaj organizoj**, en konsultaj rilatoj kun la UNa *Ekonomia kaj Socia Konsilio* (kateg. I), UNICEF kaj UNESKO (categ. B).

Historieto de historia decido

La sciigo okazis per letero al ASISTI-Sekretario, verkita de Rev. John J. McAuley (Asistanto de la Sekretario Ĝenerala d-ro William F. Vendley), datita je la 30-a de januaro 1997.

La unuaj kontaktoj inter WCRP kaj ASISTI okazis en aprilo 1989 (do fakte tri monatojn antaŭ ĉi ties oficiala fondiĝo!) per intervjuo de la elektota ASISTI-sekretario kun Patro Joel Massip, eksa Ĝenerala Sekretario de *WCRP/France* kaj eks-estrarano de *WCRP/Europe* (Asistilo n-ro 3, p. 38).

En aŭgusto 1993 en Bangaloro (Bharato) la ASISTI-sekretario partoprenis en la 100-a datreveno de la *Monda Parlamento de la Religioj*, kunorganizita de WCRP, *Monda Kongreso de Kredo*, *Templo de Kompreno*, kaj *Internacia Asocio por Religia Libereco* (angle mallongigite IARF, kies membro ASISTI tiu-okaze fariĝis).

En sept. 1993 delegito de ASISTI partoprenis, dank'al TEJO, en internacia kolokvo organizita de la "WCRP-Junularo". (Tie prelegis i.a. s-ro Hans Ucko, ano de interreligia komisiono ĉe *Ekumena Konsilio de Eklezioj*.) (Trad. en n-ro 15 p. 3.)

Ĉe Pasko 1994 ASISTI decidis, en kunveno dum ĝia unua *Interreligia Seminario Esperantista*, en Tábor (Ĉeĥio), aliĝi al WCRP (n-ro 15 p.7).

ASISTI-France membriĝis ĉe *WCRP/France*, kaj ASISTI sendis oficialan aliĝpeton al WCRP; kaj en novembro de la sama jaro la ASISTI-sekretario partoprenis kiel "frata deligito" en la 6-a *Monda Sesio* de WCRP en Vatikano kaj Riva del Garda, kie li povis rekte prezenti la aliĝpeton al la tiama (sed tuj ekŝigonta!) *Moderator* de la Ekzekutiva Komitato de WCRP, d-ro Aram (Bharato)...

En decembro 1995 s-ro Yoshimi UMEDA, ASISTI-prezidanto, vizitis la WCRP-sidejon en Nov-Jorko por denove rekte transdoni la oficialan aliĝpeton al la kompetenta aŭtoritato.

Kaj la decida paŝo estis interparoladeto de la ASISTI-aj prezidanto kaj sekretario kun la WCRP-Sekretario Ĝenerala d-ro William F. Vendley, en Iksan (Sud-Koreio) okaze de Monda Kongreso de IARF en aŭgusto 1996.

(Verŝajne ankaŭ influis la decidon, kvankam nerekte, la poresperanta pledo de la Ŭon-budhisma ĉefmajstro ĉe la UNa sidejo enkadre de WCRP-ceremonio jubilea (22-9-1995: vidu n-ro 19 p. 6-7).

Plue : Unuiĝintaj Religioj ?

Jam en junio 1996 okazis en San-Francisko, Konferenco por konsideri la kreadon de "*Unuiĝintaj Religioj kiu, laŭ spirite taŭgaj manieroj, estus paralelo de UNO*"*.

Tiam estis planata por la sekva jaro [97] Ĉartverka konferenco, kunvenigonta "ĉ. 200 homojn, inkluzivanta signifan nombron da virinoj kaj ĉebazaj religiaj kaj spiritaĵaj gvidantoj"*.

S-ro Y. Umeda, ASISTI-prezidanto (sed verŝajne ĉefe kiel Ĝenerala Direktoro de *Internacia Ŝintoa Fondaĵo*), partoprenis en tiu ĉi "konsulta kunveno pri la fondaĵo de nova interreligia instituto nomota United Religions, kiu celas kvazaŭ *Unuiĝintaj Nacioj de la Religioj en la mondo*"** (en junio 1997, ankaŭ en San-Francisko).

Ni ankoraŭ ne scias kia estis la rezulto, sed jen kiuj estis la **solvendaj demandoj** laŭ Rev. Robert Traer, Ĝenerala Sekretario de IARF :

"1. Kio estas signifata per "*Unuiĝintaj Religioj*" ? Ĝis nun *Unuiĝintaj Religioj* estas simbolo pli ol koncepto. Iuj partoprenantoj en la 1996-konferenco firme kontraŭstaris "*UNO*-n" de la religioj, kvankam ŝajnas ke tio estis la originala celo. Pluraj partoprenantoj havis **preferon al ia malcentrigita reto**, kun pli ol unu centro.

2. Kiel la "religioj" estos reprezentataj ? Religiaj tradicioj estas diversaj, kaj la historiaj tradicioj inkluzivas milojn da religiaj komunumoj. Novaj religiaj movadoj en tiu ĉi jarcento ankaŭ povas pretendi religiecon. Se la *Unuiĝintaj Religioj* devas havi rilatojn kun lokaj, naciaj kaj internaciaj religiaj kaj interkredaj organizoj, **kiamaniere tio ĉi povos plenumiĝi ?**

3. Kiu estos aŭtoritata por solvi tiujn ĉi demandojn ? **Kia proceduro** de pridiskutado inter religiaj, spiritaĵaj kaj interkredaj gvidantoj taŭge "repzentos" la religiojn, kaj do havos la aŭtoritaton kaj konfidindecon por decidi kion *Unuiĝintaj Religioj* povus signifi, kaj kion tia organizo devus fari ? Kia partopreno en tiu ĉi decid-proceduro estas necesa por taksu ĉu iu koncepto de *Unuiĝintaj Religioj* estas kaj realigebla kaj dezirinda ?"

...Kaj ni ŝatus aldoni la **lingvan demandon !**

* Rev. Traer, "California United Religions Conference" (en *International Interfaith Centre*, n-ro 5 (7-1996) p. 4).

** Fakso de Y. Umeda, datita je 30-6-1997.

Iniciato por Unuiĝinta Religiaro

La ideo venis al Episkopo William Swing, de la Katedralo Graco en San-Francisko, komence de 1993 kiam la Unuiĝintaj Nacioj petis lin organizi interreligian diservon en San-Francisko okaze de la 50-jara jubileo de la tiea subskribado de la UN-ĉarto (...) El tio kreskis la iniciato por starigi Unuiĝintan Religiaron (UR), kiu estu daŭra, tutmonda, interreligia asembleo dediĉita krei pacon inter religioj tiel ke ili povu kunlabori por la bono de ĉia vivo kaj por resanigi la teron.

La iniciato celas ne krei unu grandan religion, sed kunigi religiojn kaj spiritajn tradiciojn al komuna tablo kie, respektante reciproke siajn diferencojn, ili povos serĉi la komunan terenon necesan por paciĝi inter si kaj kunlabori, interparolante kun organizoj lokaj, naciaj kaj internaciaj, por krei daŭrigeblan estonton por ĉiuj homoj sur la tero.

La 23-an de junio 1996 la iniciato transiris de persona nivelo al nivelo korporacia. Ĝi havas oficejon kun 5 stabanoj kaj 37 entuziasmaj volontuloj. Multiĝas la komunikado kun diversreligiaj homoj tra la mondo. Multan subtenon ĝi ricevas el plej diversaj fontoj, eĉ nereligiaj.

Oomoto aktivas en la iniciato, kaj ankaŭ Ŭonbudhismo en Koreio : ankaŭ **tiu ĉi jam de pluraj jardekoj faras similan proponon.** ➔

Iniciato 2000 por Unuiĝinta Religiaro resume Episkopo William Swing

La celo de la Iniciato 2000 por Unuiĝinta Religiaro estas estigi unu centran tutmondan interreligian organizon kiu precipe strebu daŭre kaj ĉiutage al paco inter religioj, por kontribui al paco inter nacioj kaj kompleteco por la tuta kreitaĵo.

La agmaniero inkluzivas la jenajn :

- Inviti la historiajn religiojn, la indiĝenajn religiojn, la pli junajn, pli malgrandajn religiojn en neŭtralan lokon por komenci daŭran ĉiutagan interparoladon.

- Aktivigi spiritajn movadojn por doni respekton al iliaj scioj, kaj interagi kun la historiaj, indiĝenaj, kaj malgrandaj religioj.

- Starigi mondan reton de interreligia junulara kunlaboro por prepari junulojn por tutgloba vivado.

La eblo de la Iniciato 2000 estas tiri religiojn kaj spiritajn movadojn en procedon kiu transiros de ĉartverkado al ĉartsubskribado kaj, laŭ Dia volo, la kreo de *Unuiĝinta Religiaro* en la jaro 2000.

Kontakt-adreso : United Religion Initiative, 1055 Taylor Street, San Francisco CA 94108 USA. Tel : +1 (415) 440-2303, fakse : (...) 440-2313, rete : unitrelig@igc.org

➔ La sekvanta granda paŝo estas verki ĉarton. Por tio oni organizis specialan kunvenon en San-Francisko, de la 23-a ĝis 27-a de junio 1997. Oni invitis cent homojn reprezentantajn la historiajn religiojn, kaj ne malpli grave, ankaŭ cent homojn reprezentantajn aliajn spiritajn movadojn, inkluzive de "novaj" religioj kaj indiĝenaj religioj.

Joel Brozovsky

El *Oomoto* n-ro 439, 1997, p. 21.

Ne-esperantisto ĉe la Praga UK : la Dekano de novjorka katedralo

Paroladis Pastro James Parks Morton enkadre de la fakkunsido de Oomoto, la 22-an de julio 1996.

Mi estas anglikana pastro. Dum 25 jaroj mi estas dekanato de *Sankta-Johano-la-Teologo* en Novjorko, la plej granda katedralo en la mondo (...)

En 1975 (...) komenciĝis amafero inter la Katedralo kaj Oomoto (...) Nek la Katedralo nek Oomoto restis la sama post tio (...)

Oomoto kredas je tri grandaj veraĵoj : "*unu Dio*" (dia unueco), "*unu mondo*" (homa unueco), "*unu komuna lingvo*" (ebleco de unueco en komunikado). Ankaŭ mi. (...) La tria celo estas la unueco de komunikado, la celo de **Esperanto** konservi diversajn lingvojn kaj dialektojn sed ebligi unu komunan manieron komuniki ; unueco kiu konservas la riĉecon de la lingva diverseco de la homaro kaj tamen ebligas tujan sperton de vera komunikado.

Paralele al tio kion la Katedralo kaj Oomoto faris, kune farante malsamajn diservojn, Esperanto faras por homa komunikado en lingvo. Unueco kaj diverseco kune. (...)

Mi forlasos la Katedralon en 1997. (...) Mi decidis (...) labori plentempe pri interreligiaj rilatoj, por konduki aliajn al la sperto de la Katedralo kaj Oomoto.

Kiel ? Tio estas alia parolado, sed simple, per la kreo de **interreligia centro en Novjorko**, kie malsamaj religioj povos veni por esti vidataj kaj komprenataj. Mia revo estas ke ĉiu ĉefa urbo en la mondo havu tian interreligian centron kie oni povas honori kaj la unuecon kaj la diversecon de la religioj. Loko kie oni povas respekti kaj ĝui amon kaj belon kaj historion. Ĝi estos vivanta Esperanto de la religia travivaĵo.

Do, mi dankas kaj Oomoton kaj Esperanton pro tiu ĉi neatendita donaco kiu ŝanĝis mian vivon.

(Tradukis J. Brozovsky, el *Oomoto* n-ro 439, p. 28)

Averto al la Unuiĝintaj Religioj

Pluraj tutmondaj iniciatoj stariĝis por fondi ian konstantan konsilion de religiaj gvidantoj kiuj konsiderus mondajn problemojn kaj proponus religiajn solvojn kiel unuiĝinta fronto. *Babaĝi* estas skeptika pri tia plano krom se ĉiuj engaĝitaj estas vere dharmoplenumantaj. Li rekomendas pli praktikan aliron : komencu celebri la festojn de ĉiu religio en ĉiu sankta loko. Tiu ĉi metodo jam estas praktikata ĉe *Gobind Sadan*, kaj la homoj nature disvolvas ŝaton por ĉiu el la profetoj.

Al unu el tiuj ĉi grupoj provantaj organizi interkredan konsilion, *Iniciato por Unuiĝintaj Religioj*, *Babaĝi* sendis jenan mesaĝon :

« **Via intenco estas bona**, sed antaŭe mi povas diri al vi ke tiu metodo kiun vi adoptis ne sukcesos. Grandaj kunvenoj okazos ; kaj estos konfliktego. Male, **kiam la profetoj venis**, la padoj sur kiuj ili paŝis, estis serenigataj. La arboj preter kiuj ili pasis, la vento tra kiu ili pasis, estis serenigataj. La homoj alvenis ĉirkaŭ ilin, kaj tio estis iliaj kunvenoj. Ili ne havis konstruaĵojn. Ilia tegmento estis la ĉielo ; ilia lito estis la tero. Sed la tero mem kisadis iliajn piedojn. La ĉielo kliniĝis antaŭ ili, la vento kisis ilin, la floroj kultis ilin per parfumoj, kaj la steloj kultis ilin per lumoj.

Se ni vere sekvas la mesaĝon de la profetoj, **la religio jam estas unuiĝinta**. Sed se mi ofertas miajn pensojn, kaj vi donas la viajn, ĉiam estos konflikto de pensoj. (...)

Unue disvolu fidon en viaj propraj mensoj. Poste disvolu religion en vi mem. Disvolu internan kuraĝon. Parolu al Tiu kiu sidas en vi. Tiam vi miros : "*Kiun religion ni devas unuiĝi ? La arboj estas saturitaj de dharmo. La dharmo moviĝas en la oceanoj. Ne estas apartaj iluminaj saĝoj.*"

Vi volas kunigi la gvidantojn, sed kiu estas gvidanto ? Dio kreis vin nur servistoj. Se vi volas kunigi centon da homoj, cento blovos en siajn proprajn kornojn, ludante sian propran melodion. En tiu loko *estos* multaj religioj. Se estos cento da homoj, estos cento da voĉoj.

Ne estas novaj religioj. La Profeto Mahometo diris : "*Mi ne venis por ŝanĝi eĉ unu vorton de miaj pliaĝuloj antaŭaj aŭ postaj*". Kiam la profetoj venas ili referencas tiujn kiuj jam alportis la mesaĝon de Dio. Guru Nanak diras : "*La memorado de Dio jam estas priskribita en la Vedioj, sed ni ne aŭskultas. Ĉiuj sanktaj skriboj, tiaj kiaj la Vedioj, la Puraĵoj, la Sankta Korano kaj mia propra skribaĵo, ĉiuj diras la samon* : 'Sen memorado de Dio ĉio estas falsa kaj senutila'. *Mia skribaĵo, la Guru Granth Sahib, proklamas* : 'Ili ĉiuj parolas prave. Ni devas kredi ilin'." »

Baba Virsa Singh

El News from Gobind Sadan, junio 1997, p. 4.

Por ami Dion : praktikaj instruoj

Ĉiuj profetoj fontas el la sama lumo. Ili ĉiuj donas la samajn bazajn mesaĝojn. Neniu venis por ŝanĝi la antaŭajn profetaĵojn ; ili venis por memorigi al homoj pri la antaŭaj mesaĝoj de profetoj, kiujn ni jam forgesis. Ni faris apartajn religiojn kvazaŭ fortikaĵoj kun muroj, ĉiu religio pretendas ke unu profeto estas ĝia propra. Sed la lumon de Dio ne eblas limigi ene de homfarita konstruaĵo. Ĝi radias tra la tuta Kreita Universo. Kiel, do, eblas ĝin posedi ?

Nia limigita pensado kreis la fortikaĵon kaj sloganojn de religioj. Se vi aliras la sanktajn skribojn de ĉiuj religioj, saĝe vi trovos multajn similaĵojn inter ili. **Kio estas la esenco de religio ?** Ver-dirado, amo, fido je Dio, servado al ĉiuj.

Meditadi estas fariĝi profunde silenta, daŭre aŭskulti, aŭskulti, aŭskultadi Dion. Aŭskulti estas perdiĝi en Dio, percepti Dion en ĉiuj kreitaĵoj. Tiel oni mergiĝas en la Vera Realo. Neniu monda plezuro estas komparebla kun la dolĉeco de tiu unuiĝo.

La sola sukcesa meditmetodo estas senĉese ami Dion. Unue fokusadi sian diseman atenton je Dio, sub kies ajn formo oni ĝin adoras, ekzemple Jesuo, Ŝri-Kriŝno, Budho¹, Ŝivo aŭ iu guro. Ĉar la menso emas vagi, ni povas atentadi je Dio ripetante Dian nomon. Energio, disa en niaj malfortoj, tiel kolektiĝos ; malbonaj pensoj malaperos **kaj vero aperos** en nia menso (...) Estos nur paco. Komencu tiel kaj Dio montros al vi la vojon. Ne havu postulojn, krom unu : "*Ho, Dio, igu min esti tia kia vi volas min*".

Dio donis al ni menson tiel delikatan, tiel plenan je amo kaj vero. Sed, maltrankvilante, ni malmoligas ĝin. De mateno ĝis vespero ni maltrankvilas pri la estonto. Ni eĉ kreas akcidentojn pro nia maltrankvilado. Anstataŭe, tenu forte veron, amon kaj ĝojon per amo al Dio. Ni finfine konfesu ke **nenio okazas sen Dia ordono**. Ni unuiĝu kun tiu kiu ordonas.

Ĉiu persono devas labori kaj helpi aliajn ĉar tio estas ordono de Dio². Tiu kiu nure sidas kaj meditas ne trovos favoron en la kortego de Dio, ĉar li ne helpas homojn, kaj ankaŭ en la mondo li ne trovos favoron.

Dio laboras diligente kaj ĉiam feliĉas. **Se ni amas Dion ni estos feliĉaj** dum ni servos, kaj ni restos kun li.

Je la momento kiam oni tuŝas Dion oni pleniĝas je amo.

(*Eltiraĵoj tradukitaj de Majk Sadler*)

1/ Pri vortumo *adori Budhon* eblas diskuti sed tamen...

2/ La adeptoj de *Babaĝi* manĝigas milojn da maltriĉuloj kaj starigas kuracejojn kaj lernejojn por ili.

Senpretendaj rakontoj pri

Mi alvenis al Bharato iom hazarde. Dum tutjara vojaĝo tra Azio, mi ne volis nur turismi kaj renkonti esperantistojn. Tial mi aliĝis al labortendaro organizita de *Service Civil International* ("Internacia Civila Servo", neregistara organizo [poste mallongigita SCI]) en Bharato, novembre-decembre 1996.

Tio kion mi spertis en Bharato estis do grandparte tute ne atendita, kaj eble despli interesa. Espereble tiuj rakontoj estos same interesaj por la legantoj de *Asistilo* kiel la travivaĵoj estis por mi.


Riŝikeŝo, nov. 96. Mi venis ĉi tien por viziti disvolvan projekton de SCI en montaraj vilaĝoj norde de Riŝikeŝo, en Himalajo. En mia gvidlibro mi surprize malkovris ke Riŝikeŝo famiĝis en la 60-aj jaroj ĉar la brita popgrupo *Beatles* lernis meditado en tiea aŝramo ! Dum mi estis for, en la vilaĝoj, mia kunulino sekvis prelegojn pri jogo, menso k.a. en unu el la multaj aŝramoj. Kiam mi revenis al la sankta hindua urbo (Riŝikeŝo situas ĉe la Gango) Solveig rakontis al mi tion kion ŝi aŭdis. La komparoj kiujn la preleginto faris inter la kristana kaj hindua religioj estas tre interesaj. Ne eblas resumi ĉi tie la prelegojn, sed tiu unua sperto de la spirita vivo en Bharato instigis al plia ekkono.

Vârânasî [PIVe : Banaraso], nov. 96. Post la unua labortendaro kiu okazis proksime de Vârânasî, ni ja tutsimple "devis" viziti la plej sanktan urbon de la hinduoj. Tien venas pilgrimantoj el tuta Bharato por bani sin en la sankta Gango, preĝi aŭ bruligi siajn mortintojn kaj ĵeti iliajn cindrojn en la sanktan riveron.

En nia gastejo, sur librobreto, mi trovis membiografion de Mahatma Gandhi. Scivoleme mi eklegis la unuajn liniojn de la unua ĉapitro ...kaj ekkaptiĝis ! Dum du tagoj mi legis multe, sed devis redoni la libron kiam mi forlasis Vârânasî. Kaj bedaŭrinde la libron ne eblis trovi en librovendejo en la urbo.

Sed antaŭ Gandhi kaj Gango, mi jam venis al Sarnatho, nun antaŭurbo de Vârânasî. Tien la volontulojn veturigis la organizantoj de la labortendaro, kaj mi subite havis mian unuan renkonton pri budhismo. Sarnatho ja estas sankta loko por budhistoj ĉar tie la Budho, 500 jarojn antaŭ Kristo, parolis al siaj disĉiploj sub granda arbo. Restas nun ruinoj de budhisma monaĥejo kaj, tute apude, funkcia Ĝajn-templo. Ĝajnoj havas multon komunan kun budhistoj (ilia ĉefa trajto estas absoluta neperforto, ankaŭ al bestoj : tial ili estas vegetaranoj) sed ilia religio ne disvastiĝis ekster Bharato¹.

Turistoj venas al Vârânasî por vidi la *ghat*-ojn, aŭ ŝtuparojn, al Gango kie hinduoj banas sin, lavas siajn vestaĵojn, ktp. Por ni (okcidenteŭropaj ne-hinduoj) iom malfacile estas kompreni ke homoj emas bani sin en tia malpura kaj poluita akvo, kie flosas interalie kadavroj de (sanktaj) bovinoj.



Toleremo : moskeo kaj ghato en Vârânasî (Cl. Rouget)

Lasta religia sperto en Vârânasî estis vizito al infanejo kiun prizorgas Misiistinoj de la Karitato (t.e. fratinoj el la ordeno de Patrino Tereza). Mi miris pri la absoluta fido al Kristo kaj mildeco de la religiulinoj. Ili pacience vizitigis al ni la infanhejmon kaj respondis al niaj demandoj. Se mi tiam ne renkontis Dion, ŝajnis al mi ke mi almenaŭ renkontis iujn kiuj renkontis Lin.

Mungero, nov. 96. Post Vârânasî mi decidis viziti *Servas*-anon*, kies profesio estis ...budhista pastro. Kun li mi havis interesajn diskutojn pri budhismo, hinduismo kaj aliaj religioj².

* "*Servas*" estas porpaca organizo internacia, kies membroj gastigas aliajn membrojn : kiel "*Pasporta Servo*" por esperantistoj. [Fakte la nomo mem estis ĉerpita el esperanto !].

spiritaj renkontoj en Bharato

Interese estas ke li ricevis edukon en kristana privata lernejo (kiel multaj hindoj el burĝa klaso), ekkonis budhismon dum studoj en Britio, kaj nun vivas kun sia hindua patrino kaj sikha edzino. Kiel por plimultaj paroj renkontitaj en Bharato ilia gedziĝo ne estis la rezulto de enamiĝo sed estis aranĝita [de la gepatroj].

En Mungero mi vizitis alian aŝramon, kiu similas al (bonhava) urbeto en (malriĉa) urbo. Tie centojn da dolaroj pagas kursanoj el Eŭropo [kaj Aŭstralio] por lerni el guro, diris mia budhista gvidanto. Li ankaŭ kondukis min al privata katolika lernejo (mi ja diris al li ke mi deziras viziti lernejon sed mi forgesis precizigi : por la popolo) kaj al alia infanhejmo de Patrino Tereza. Tie mi retrovis la saman mildan rideton kaj pacan etoson kiel en Vârânasî, sen la iom ĝena impresado de materia komforto en malriĉa ĉirkaŭaĵo, kiu trafis min kaj en la aŝramo kaj en la katolika lernejo.

Kalkato, dec. 96. Alian *Servas*-anon mi kontaktis, aktivan en la Gandhi-a movado por helpo al la "*netuŝenduloj*" (la plej malalta kasto de la hindua religio [fakte eĉ "*eksterkastuloj*"]).

En lia asocia oficejo mi renkontis afablajn homojn, sed unu vere impresis min. Tiu virino ja forlasis sian bone pagitan postenon post kiam ŝi vidis en televido pri tiu asocio. Ekde tiam ŝi laboras partatempe kaj por malpli alta salajro ol antaŭe. Sed ŝi havas la ĝuon fari utilan laboron. Ŝia bonkoreco kaj feliĉo facile legeblas sur ŝia vizaĝo.

Kiu serĉas, tiu trovas. Finfine mi povas aĉeti la membiografian libron de Mahatmo Gandhi en librovendejo de Kalkato. La saman vesperon komenciĝas tutmonata plenkura legado de tiu 400-paĝa verko !

En alia librovendejo, diklitera librotitolo allogas min : "*Jesuo vivis en Bharato*" de Holger Kersten. Mi legas la resumon dorsoflanke, sed ne aĉetas la libron kvankam ĝi ŝajnas interesa, ĉar mi jam havas sufiĉe por porti kaj legi.

En Kalkato mi ankaŭ vizitas ĝajntemplon grandan, belan, meze de bone zorgita parko. Sur ŝildo plurlingva, eblas legi : "*Bonvolu lasi ekstere de la templo ŝuojn, ledajn zonojn kaj aliajn aĵojn el ledo*". Malmultajn preĝantojn mi vidis, sed raton jes, kies vivon la ĝajn-monaĥoj certe ne atencos.

Madraso, dec. 96. Post la dua labortendaro de SCI ni loĝis ĉe la vicprezidentino de la loka SCI-grupo, mirinda 67-jarulo kun granda koro kaj nekutimaj ideoj. Ŝi estas denaska kristanino, sed kiam mi petis ŝian opinion pri la teorioj de

Holger Kersten (la aŭtoro de "*Jesuo vivis en Bharato*"), ŝi montris nekredeblan malfermitecon pri liaj ideoj, kiuj certe estus ŝokaj por multaj kristanoj el Eŭropo. Ĝanajra volas ke oni bruligu ŝian korpon post ŝia morto kaj ĵetu la cindrojn en la maro (hindua kutimo), por ŝpari terspacon (Bharato estas ja dense loĝata). Ŝi ne neas la eblecon de transmigrado de animo (tradicia en hinduismo kaj budhismo) kaj estas entute kritika al kristana[j] eklezio[j]. Ŝi fakte rigardas sin kristanino, sed ne volas la etiketon "katolika", baptista, aŭ kiun ajn alian.

En la labortendaro mem, estis tre bona etoso inter la partoprenantoj : ses el Eŭropo kaj kvar el Madras (Tamil Nadu, Sud-Bharato). Parte pro la nomoj kaj parte pro la sintenoj mi rapide malkovris ke inter la bharatanoj estis du hinduoj, unu islamano kaj unu kristano. Ili tre bone interrilatis inter si, kaj donis al mi la impreson ke en multaj lokoj en Bharato (bedaŭrinde ne ĉie kaj ĉiam), homoj de diversaj religioj pace kunvivas unuj kun la aliaj. Certe ili havas komunajn super sia persona kredo. La statuso de virino i.a. ŝajnas al mi ne esti tre malsama de unu religio al la alia.

En Madraso mi ankaŭ vizitis la sidejon de la Teozofia Societo, pri kio mi unuafoje aŭdis ĉe la budhista pastro en Mongero, kaj iom poste en la membiografio de Gandhi. Mi bedaŭrinde ne sukcesis eniri ilian prestiĝan bibliotekon (kie ili konservas milojn da verkoj pri ĉiuj religioj), ĉar mi ne havis rekomendleteron de du fidindaj personoj !

Cetere ilia sidejo mem, en bela kaj trankvila parko, estas inda vizito por tiu kiu volas fuĝi la bruegan kaj poluitan atmosferon de bharataj urbegoj. Pri teozofio mi ne eksciis multe, krom tio ke ĝi ne estas religio sed provo kunigi la esencon de ĉiuj religioj : unu sola Dio, transmigrado de animo, ktp.

Bangaloro, dec. 96. En trajno de Madraso al Bangaloro mi renkontis plej mirindan homon. Temis pri kristana misiisto, duone brito duone bharatano, loĝanta kaj laboranta en Nordorienta Bharato, ĉe nehinduj triboj montaraj. Li klarigis al mi kiel danĝera estas lia vivo. Meze de 60 minacaj homoj armitaj per aŭtomataj pafiloj li diris la Bonan Parolon, kaj post duonhoru ili demetis siajn pafilojn kaj ekpreĝis. Kristo ja protektis kaj gvidis lin. Mi vidis en liaj okuloj ke li ne mensogis pri sia rakonto. Cetere, vidante ke mi legas Gandhi, li asertis ke la Mahatma ("*Granda Animo*") estis multe pli kristana ol multaj kristanoj. Amuze estis aŭdi tion, kiam Gandhi mem rigardis sin kiel hinduon.

Gadago, dec. 96. Ĉe amiko de mia gastiganto mi vidis grandan foton de virino sur la muro. Mi demandis kiu ŝi estas. Francino, li respondis kun rideto. Ĉu vi konas la Patrino, disĉiplon de Aŭrobindo ?, li plu demandis, fingromontrante al alia foto de la majstro kaj lia unua disĉiplino sur librobreto. Jes, la aŝramon de Aŭrobindo en Aŭrovillo, sude de Madraso [apud Pondiĉero], mi intencis viziti, sed mi bedaŭrinde ne havis tempon. Do, krom lian nomon, mi sciis nenion³.

Kiam mi forlasis la urbeton Gadag, meze inter Bangaloro kaj Bombajo, mi estis preskaŭ finleginta la membiografion de Gandhi. Tiu ĉi verko sciigis al mi multon pri socia historio en Sudaŝtato kaj Bharato dum Gandhi-tempo (ĉ. 1885-1925), kaj pri religioj. Gandhi estis ja hinduo, sed li havis regulajn kontaktojn kaj riĉan korespondadon kun kristanoj, islamanoj, teozofoj kaj aliaj. Certe lia membiografio estas leginda de homoj interesitaj pri moralo kaj religio.

Nov-Delĥio, dec. 96. Post tiom da renkontoj interesaj mi ne plu tiom emis fijuĝi homojn kun "strangaj" ideoj. Sed "strangan" francon mi renkontis en gastejo en Delĥio. Li verkis poeziajn tekstojn absulte nekompreneblajn por mi, pensis ke li estas reenkarigo de la fama franca poeto Rimbaud (siatempa strangulo, kiu verkis inter la aĝo de 15 kaj 18, kaj ne plu unu linion poste), perdis multajn aĵojn hejme, kiuj laŭ li oni ŝtelis per pensa forto, rakontis pri la kreado de la mondo (la galaksioj estas sapvezikoj elspirataj el la haŭto de Viŝnuo), ktp. Tian homon mi estus deklarinta frenezulo antaŭ kelkaj monatoj, sed post du monatoj en Bharato mi fariĝis pli malfermita kaj tolerema al aliaj pensmanieroj kaj kredoj. Kiu firme scias ? Certe ne mi, ĉiukaze.

Cetere, kion legi post membiografio de Gandhi ? Certe, tiun "Jesuo vivis en Bharato", kiun mi vidis en Kalkato. Post ioma serĉado mi trovis la libron kaj avide ĵetis min en ĝin.

Fatepur Sikri, jan. 97. En tiu urbeto, proksima de Agra kaj iama ĉefurbo de la imperiestro Akbar, restas belega palaco kaj moskeo plurcent-jaraj. Akbar konstruigis palacon por siaj tri edzinoj. Kvankam li estis islamano li ne devigis siajn edzinojn konverti sin al Islamo, kiel estas la kutimo. Liaj tri edzinoj estis respektive hindua, islama kaj kristana. Bela ekzemplo de religia toleremo, konsiderante la tempon kaj tradicion.

Kalkato, jan. 97. Dum la trajnvojaĝo tien mi jam finlegis la libron de Holger Kersten. La titolo de la libro estis misgvida, laŭ mi. Kersten ne estas plene konvinka pri la vivo de Jesuo en

Bharato post la surkrucigo (tro malmulte da pruvaj dokumentoj restas). Male lia detala studo de la sankta mortotuko de Jesuo kaj konkludo ke Jesuo ne mortis sur la kruco estas ŝoke verŝajna kaj firdinda. Ankaŭ lia teorio ke Jesuo studis budhismon en Aleksandrio (Egiptio) aŭ Bharato estas sufiĉe bone dokumentita kaj kredinda⁴. Cetere la libro estas entute leginda de ĉiuj malfermitaj kristanoj kaj aliaj interesitaj pri kristanismo.

Kalkato estis nia lasta restadloko en Bharato ĉi-foje. En Belurmatho mi vizitis la maŭzoleon de Ramakriŝno, kiu reformis hinduismon en la pasinta jarcento⁵, kaj mem asertis ke li estas dia enkarniĝo.

Fine, estas kelkaj amuzaj detaloj dum la lastaj tagoj de nia restado en la urbego. Mi loĝis (hazarde) en la gastejo de la Sav-armeo, kaj tial trovis kelkajn disajn religiajn legaĵojn en la komunĉambro. Unu estis *Krigsropet*, nacia revuo de la Sav-armeo. Mi foliumis ĝin kaj nur kiam mia kunulino rimarkigis al mi ke ĝi estas norveglingva mi ja konstatis ke mi unuafoje de pluraj monatoj legis ion en mia hejmlingvo, kaj tio estis pri religio ! Apud *Krigsropet* kuŝis malgranda Biblio en la angla. En la unuaj paĝoj, estis biblia citaĵo en multaj lingvoj, interalie **ankaŭ en ...Esperanto**.

Kaj fine, vizitante la oficejon de FEB (Federacio de Esperantistoj en Bharato) mi trovis inter malmultaj revuoj esperantlingvaj sur librobreto – diveni kion – **jes : ...Asistilo-n !**

Jen la fino de tiuj rakontoj senpretendaj. Bharato lasis spuron en mi. Mi ne renkontis Dion, sed mi renkontis multajn mirindajn homojn kaj ekkonis multajn novajn teoriojn, ideojn kaj kredojn, kiuj pliriĉigis min. Mi estas pli malfermita agnostikulo ol antaŭe, kaj ankaŭ pli scivolema. Certe mi revenos al Bharato, ĉu por lerni meditadon kaj jogon, ĉu por viziti la aŝramon de Aŭrobindo kaj Aŭrovillon, ĉu por resti kelktempe en la aŝramo de Gandhi, ĉu por meditati ĉe la [tiel nomita] tombo de Jesuo en Kaŝmiro kaj tiu de [la apostolo] Tomaso en Suda Bharato.

Eble tiam venos novaj rakontoj por *Asistilo* !

Claude Rouget

Notoj de la Red.

1/ Tamen ekzistas "*Internacia Mahavir Ĝajn Misio*", neregistara organizo fondita de Aĉarja Suŝil Kumar-ĝi.

2/ Eble ni iam aperigos E-resumon de lia verko...

3/ Vidu tamen *Asistilo-n* n-ro 1, p. 4-5 : "*Dudekjara Auroville*" (reproduktita en *Kontakto* 1988/6, p. 9-10).

4/ Mi tute ne konsentas. Eble en venonta n-ro aperos E-resumo de mia 60-paĝa kritiko pri *Ladak[ho]* de N. Roerich (E-igita de G. Malcev), *La vivo de sankta Isa* [Jesuo], de Notoviĉ (pretende tibeta manuskripto), k.s.

5/ Fakte ne li mem (1836-1886) sed lia ĉefa disĉiplo Sŭamio Vivekanando (Narendranath Datta, 1863-1902).

30-4 (kaj 23-7) '96, Bangalore

(...) Varmajn bondezirojn ! Ĉiufoje kiam mi tenas *Asistilon* mi sentas vian varman amikecon. Kaj iu diris : vi estas la plej bona homo kiu vizitis nin ! Mi esperas ke ankaŭ vi same sentas kiam vi pensas pri ni. Eble ĉi tio estas la plej nobla kontribuo de Esperanto al la homaro, ĉu ne ?

(...) Mi estas feliĉa ke vi iris al Koreio : okaze de la UK-1979 en Seulo mi prelegvojaĝis dum unu monato en **Koreio**, belega lando konata kiel "*kvieta lando*" : tiel unuafoje diris Rabindranath Tagore [la mondfama bengala poeto] de Bharato.

Estas alia rakonto : Kiam Dio kreis la mondon li bezonis sep tagojn por konstrui ĝin : li faris Koreion dum ses tagoj kaj en unu tago faris la reston de la mondo. Koreio estas tiel bela.

Nia eŭropa vizito eble realiĝos post kelkaj jaroj, sed ne nun. Mi volas viziti eble kun mia edzino (...)

Kun aliaj amikoj ni daŭrigas la E-agadon en nia urbo. Ankaŭ mi sole eldonas la E-o bultenon. Mi estas feliĉa ke vi sukcese eldonas *Asistilon*.

Mi parolis pri asocio por mens-handikapuloj apud mia hejmo. Nun mi estas ties sekretario kaj iom multe aktivas por tiu. Mi volas multe aktivi : nur tiam mia tuta energio elvenas.

En mia lingvo [la *kannada*, esperante : kanara ?] estas abunda bona literaturo. Kelkaj verkoj estas tre riĉaj pri filozofio kaj ĉiutaga vivo. D-ro **D.V. Gundappa** verkis strofaron "*de Mankutimma*" (t.e. "la naivulo") pri *Tattva* [la esenco] de la vivo. Alia, klasika aŭtoro, estas Basaveŝveŝvasa (1200 p.K.), kiu verkis *vaĉanas*-strofojn pri la unueco de la homaro, la egaleco de la religioj (...)

Mi pensas ke tio povas esti bona materialo por *Asistilo*. Mi intencas traduki kaj sendi al vi. Jen **ekzemploj** por ke vi donu al mi vian opinion :

1. Dio nomis [= nomante kreis ?] la sorton, [por] ke la homaro lernu kompaton. Ne ekzistas aliaj : diru "ĉiu estas parto de Atmo"¹ kaj miksiĝu en la universo. *Mankutimma*

2. Ne diru ke la vivo estas senutila batalo : vi komprenus ĝin en tuta vido : dancas Dio en la senvivantaj kaj en la vivantaj. Se vi komprenus ĉi tion, estus bele. *Mankutimma*

3. Insekto naskiĝas kaj mortas, tero eluziĝas kaj solviĝas, ie en la oceano aperas nova insulo ; mortiĝas ĉi-tie, kreskas ie : senfina estas la universo. *Mankutimma*

Samanvitâ, nia filino [fotita 15, p. 27], nun estas 3-jara kaj iras al la infanlernejo. Rûpâ [lia edzino] kaj miaj gepatroj estas sanaj. Denove salutas amike

S.S. Pradhan

1/ Aŭ : la *atmano*, laŭ PIV.

Katolika respondo al la Redaktoro

– "*Ĉu la homo ne estis kreita libera ? Kiel li malrajtus uzi sian liberecon, eĉ kontraŭ tiu amo ?*" (n-ro 19, noto p. 15) : inteligenta kaj provoka demando fronte al la aserto ke, laŭ kristanismo, homo ne rajtas rifuzi la transnaturigon ofertitan de Dio.

– **Respondo.** La vorto *libera* havas almenaŭ du signifojn : *kapablo* elekti kion oni volas, *rajto* elekti kion oni volas. Ĉu la homo, kreita libera, kapablas, nur nivele de sia volo, rifuzi aŭ akcepti tiun planon kiu enigis homon al supernaturo ? Li *kapablas* : fakte iuj publike aŭ sekrete tiel pensas kaj volas. Ĉu la homo *rajtas* rifuzi tiun planon ? Pliklare : ĉu ekzistas aŭ ne la *rajto* rifuzi la vokiĝon al la dia famileco kaj al la dia naturo, *rajto* kiu povus esti praktikata sen ke Dio estas neobeata kaj la homo nesenigata je io esenca por sia propra feliĉo ?

Laŭ la kristanaj dogmoj kaj tradicio, nur Dio konas la bezonojn kaj la aspirojn kaj sopirojn, konsciajn aŭ nekonsciajn, de la homa koro, ĉefe kiam tiu ĉi eliras el tiu ĉi vivo. Neakceptante tiun donacon de la dia amo, la homo ne akiras tiun celon sen kiu li ne sukcesus resti eĉ en siaj naturaj kreitaj limoj. Tiuj ĉi, fakte, nun ne plu ekzistas ĉar Dio, levante homon al la unika kaj ekskluziva kapablo vivi ĉe li, mem fariĝas la unika posed[a]o kaj kontentigo de tiuj aspiroj kaj sopiroj.

Kaj plue ĉu homo sukcesus eliri el tiu plano ? Li ne sukcesus ĉar ne ekzistas alia plano kaj lia konduto juĝiĝas kaj taksiĝas laŭ tiu plano.

Provu komparon. Iu al mi eksplikas la teoremon de Pitagoro, kiun mi komprenas kaj pro evidenteco mi akceptas. Fronte al ĝi tamen, mi povas ĉiam nei la evidentecojn kaj konsekvencojn. Post tiu neo, kohere mi min trovas en malordo intelekta kaj praktika. Metu nun en la lokon de la pitagora teoremo la donacon de Dio en Kristo, ni metu en la rifuzon de la evidenteco la rifuzon de la dia definitiva supernatura ordo, ni metu en la konsekvencojn intelektajn kaj praktikajn la perdon de la ĝusta rilato kun Dio. Ĝuste tio okazus !

Tiupunkte mi devus demonstri ke tia deklarita doktrino estas reale la kristana doktrino. Sed tio troveblas en sennombraj verkoj pri kristana teologio en la franca, itala, germana, angla... kaj latina.

Pli engaĝe estus pruvi ke tiu ĉi dia donaco valoras, kaj devigas ĉiujn homojn. Fakte estas dirate, ĝuste en tiu ĉi doktrino, ke neniuj alvenas, eksplacite aŭ implicite, al Kristo sen la alvoko de la Patro kaj sen sia persona kunlaborado : faktoj, tiuj ĉi, ne kontroleblaj de la homa esploro.

Armando Zecchin, Luciano Mantaut

Ĉu teologie pravigeblas supereco

II – La religian plurecon fronti : de fundamentismo ĝis unuecismo

Ke ekzistas diversaj religioj kiuj ĉiuj proklamas ke ili sekvas la unusolan veran Dion, ke ilia profeto estas la savanto de la homaro kaj ke iliaj instruoj devas konsistigi la aŭtoritatan principaron kaj leĝaron por la homa socio, tio por malreligiuloj jam pruvas en si mem la falsecon kaj stultecon de religio ; por religiemuloj tiu fakto povas esti nur konfuziga (aŭ eble ili kapablas ĝin percepti kiel riĉan minejon donitan de Dio por ke ĉiu povu trovi el ĝi laŭ sia bonplaĉo) ; ĉiun veran religianon tiu ĉi fakto povas nur ĝeni kaj ĉagreni*. Kiel do ĝin kompreni ?

a/ Fundamentismo

Multaj religianoj solvis kaj solvas tiun ĉi fakton de religia plureco per iasenca ignoro : dekomence ili malakceptas la egalecon de la religioj kaj opinias la propran supera. Ili opinias ke tiu ilia propra religio iam devas, per pli aŭ malpli truda kaj agresiva misiado, venki ĉiujn ceterajn. El tiu vidpunkto nur la propra religio estas la vera. Ĉiuj alikredantoj estas konsiderataj kiel misgviditoj aŭ paganoj kiuj iam devos konvertiĝi al lia propra religio.

Malgraŭ ke ankaŭ en Hinduismo kaj Budhis-
mo lastatempe pli kaj pli leviĝas agresaj misiadoj, tiuj du religioj tradicie estas konataj kiel ege toleremaj kaj malagresaj.

En la Judaismo tamen oni trovas la instruon ke estis sole Moseo "*kiun la Eternulo konis, vizaĝon al vizaĝo*" (5 Mos** 34, 10), kun kiu Li parolis "*buŝon kontraŭ buŝo*" kaj kiu vidis "*la bildon de la Eternulo*" (4 Mos [t.e. Nombroj] 12, 8), kaj kies leĝoj estas perfektaj, neplibonigeblaj kaj validas eterne. La atendita Mesio sekve ne povas alporti novan leĝon sed nur plenumi la Mosean kaj konduki ĉiujn homojn sub tiun. Religioj kun pretendoj je propra leĝdona libro, kiel precipe kristanismo, islamo kaj bahaismo, tiel malakceptatas kaj konsideratas homa uzurpado.

* Mi do devas konkludi ke mi mem, kvankam ano de "*vera religio*" (laŭ la aŭtoro), ne estas vera religiano, ĉar nek ĝenita nek ĉagrenita ? (*Notoj de la Red.*)

** T.e. *Readmono*, atribuita al Moseo, kvankam oni uzas la trian personon por paroli pri li, kaj rakontas lian morton (34, 5-7). Preskaŭ ĉiuj ekzegezistoj nun opinias ke parto el ĝi estis probable verkata en 622 a.K. (vidu II Reĝ. 22,8-13 kaj II Kroniko 34, 14-21), do ĉirkaŭ ses jarcentojn post Moseo.)

Simile, en kristanismo oni trovas ekskludajn pretendojn sin bazantajn sur novtestamentaj eldiroj, kiel ekzemple : "*Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu kiu fidus al li ne pereu sed havu eternan vivon*" (Joh 3, 16) ; "*Kiu vidas min, tiu vidas ankaŭ Tiun kiu min sendis*" (Joh 12, 45) ; "*En neniu alia estas savo ; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu vi devas esti savitaj*" (Agoj 4, 12) ; "*Ĉar ekzistas unu Dio, kaj unu interulo inter Dio kaj homoj, homo, Kristo Jesuo*" (I Tim 2, 5).

La kristana eklezio el tio jam tre frue faris la dogmon ke ekster ĝi eblas nek saviĝo nek nova profeto ; Jesuo estas deklarita Di-egala, stato kiun neniu iam povos atingi. Dum en judaismo gvidaj teologoj povis en kristanismo kaj islamo vidi, se ne veran religion, tamen almenaŭ sistemojn alproksimigantajn la venon de la Dia Regno kaj disvastigantajn la Sanktan Vorton, kristanaj teologoj dum multaj jarcentoj deklaris ĉiujn nekristanojn herezuloj kondamnitaj al infero*. La hebreoj estis anatemataj kiel Di-krucumintoj, kaj Mahometo primokata kiel "*mensogo-profeto*" kaj "*antikristo*". Nur dum la lastaj jardekoj la kristana pozicio signife moderiĝis.

La islamo en Korano ja akceptas Moseon kaj Jesuon kiel diajn profetojn. Sed ofte ĝi kondamnis kaj kondamnas hinduismon kaj budhismon, kaj pretendas por si la absolutan kaj finan pravon. Mahometo estas deklarita kiel la "*sigelo de la profetoj*" (33,41), kiun neniu povas posteuli. Kaj troviĝas en la Korano eldiroj kiel : "*Hodiaŭ Mi perfektigis por vi vian religion, kaj Mi plenumis Mian gracon por vi, kaj Mi elektis por vi la Islamon kiel religion*" (5,4) ; "*Vere, la sola religio antaŭ Allah estas la Islamo*" (3,20) ; "*Kiu serĉas alian kredon ol la Islamon, sciu : neniam ĝi estos akceptita de Li, kaj en la tago de la Juĝo li estos unu el la perdantoj*" (3,86). Islamaj teologoj tiel deklaras sian religion perfekta kaj por ĉiam adekvate kaj kontentige respondanta la bezonojn de la homaro. Kaj la antaŭvidita kaj atendita *Maĥdi* aŭ *Kaim* laŭ ortodoksa instruo estas ne profeto sed nur restariganto de la islamo, ĝin disvastiganta tra la tuta tero.

* Tia ne estas la instruo de Tomaso la Akvinano, la plej klasika katolika teologo (XIII-a jc) : li male diras ke kiu ne aŭdis pri Jesuo bezonas nur sekvi la internan voĉon de sia konscienco por eniri en la paradizon.

de iu religio super alia ? (fino)

Tre bone konata estas la maltoleremo kiu sekvis kaj ankoraŭ sekvas el tiu ĉi teologia pozicio, kaj la nekalkuleblaj suferoj kiujn ĝi kaŭzis dum la al ni konata historio, precipe al tiuj religianoj ie troviĝantaj minoritate kaj tiel facile fariĝantaj viktimoj de religia superemo. Tiun ĉi sintenon de memaltigo kaj ekskludo de ĉiu alia, kune kun agresemo, mi nomas fundamentismo.

Certe la problemo de la religia fundamentismo, dum la lastaj jaroj ŝajne ekakceliĝanta, meritas ankoraŭ pli profundan trakton.

b/ Toleremo

Observi en sia propra religio la fundamentisman sintenon de memaltigo, orgojlo, maltoleremo, fanatismo kaj agreso, kaj la sekvantajn persekutojn, subpremadojn kaj amasajn ekstermadojn, tamen ofte ankaŭ kaŭzis ĉe multaj kredantoj grandegajn internajn suferojn kaj ilian malaprobon. Ili trovis en sia religio instruojn kondukantajn al reciproka akcepto, tolero, kunlaboro kaj amo. La historio ankaŭ konas sennombrajn ekzemplojn de paca kaj kamarada kunekzistado de malsamaj religioj.

Jam en la mezepoko estas de tempo al tempo homoj kiuj trovis ankaŭ ĉe aliaj religioj bonon kaj veron, kaj kiujn instruis la propra al toleremo kaj paca najbareco. Sed precipe dum la lastaj cent jaroj aperis ne nur scienca branĉo sisteme esploranta kaj komparanta la diversajn religiojn, sed ankaŭ multaj organizaĵoj, parte tutmonde agantaj (ekzemple *"Templo de Kompreno"*, *"Internacia Asocio por Religia Libereco"*, *"Monda Konferenco pri Religio kaj Paco"*), por antaŭenigi la interreligian dialogon, reciprokan komprenon kaj pacan kunagadon favore al mildigo de la konfliktoj kaj minacoj turmentantaj la homaron.

Tiel nuntempe praktike ĉiuj esencaj libroj kaj gravaj dokumentoj de la diversaj religioj estas tradukitaj al la plej multaj lingvoj kaj relative facile alireblaj (la bibliografio *"Religia Literaturo en Esperanto"* bele pruvas kiomgrade tio validas ĉe por Esperanto). Tio ne malebligas misprezentojn, sed almenaŭ seriozaj esplorantoj trovas ampleksigan dokumentaron kiu malhelpas tiri kliŝan kaj antaŭjuĝan bildon pri iu religio aŭ ties profeto.

Samtempe la konstante akceliĝanta migrado respektive intermiksado de la popoloj kaj kredoj, kune kun la interreligiaj organizaĵoj, ne nur donas la eblon sed ofte eĉ konfronte devigas ekzameni aliajn religiojn. Ofta konkludo sin trudanta estas ke – same kiel en la propra anaro – ankaŭ aliloke troviĝas kaj bonuloj kaj malbonuloj ; kaj ke ne

permesblas simple la propran, ĉiam bonan teorion kompari kun la kutime multe malpli bona praktiko de la aliaj.

Sinteno de toleremo kaj paca kunvivado ja estas jam grandega progeso kompare kun agresa fundamentismo. Tia sinteno tamen, kvankam akceptanta ke ankaŭ ĉe aliaj estas vero, kutime konservas la propran religian konvinkon kiel la plej gravan kaj pravan. La fremda religio estas rigardata kiel ja tolerenda kaj eble interesa, explorenda kaj inspirige riĉa, sed ĝi restas juĝata laŭ la propra starpunkto kaj tiel devas resti iasence fremda.

Sed eblas ankoraŭ plia proksimiĝo inter la religioj.

c/ Unuecismo

Interesa fenomeno, sufiĉe klare observebla ĉe la semida-malgrandazia ĉeno de religioj – judaismo, (zoroastrismo), kristanismo, islamo kaj bahaismo – estas ke **ilia teologio, malgraŭ kelkaj esceptoj, kutime povas senprobleme akcepti la antaŭirintajn revelaciojn.**

Judaismo sin bazas sur la profetoj Abraham kaj Noa'. Jesuo konstante konfirmis siajn instruojn per cito de la malnovtestamentaj profetoj ; kaj multaj kristanaj teologoj interpretis la antaŭkristan religian historion kiel nepre preparantan por kaj kondukantan al la apero de la Kristo.

La islama teologio vidas ĉenon de revelacioj ek de Adamo ĝis fine Mahometo, la *"sigelo de la profetoj"*. En la Korano ni legas : *"Diru : Ni kredas je Allah kaj je tio kion li sendis al ni, kaj je tio kion Li sendis al Abrahamo kaj Ismael kaj Isaak kaj Jakob kaj al ilia idaro, kaj je tio kio estis donita al Moseo kaj al Jesuo, kaj je tio kio estis donita al la profetoj de ilia Sinjoro. Ni neniel distingas inter ili kaj ni submetiĝas al Li."* (2, 137)

Tamen, eĉ se ofte senprobleme akcepteblas la antaŭirintaj, **des malpli facile la postvenantaj trovas akcepton.** La kristana teologio, kun nur tre malmultaj esceptoj, vidas en Mahometo nur homon kaj ne Jesu-egalan profeton kiel la islamanoj mem. Same, por la judaisma teologio Jesuo kaj Mahometo estas eble gravaj religiaj reformistoj sed ne plenaŭtoritataj Di-senditoj.

Tiu problemo de absorbo de la antaŭa kaj malaprobo de la posta konsistigas kernan problemon por la rilatoj inter la religioj.

Tiu ĉi problemo evidente solveblas nur per pozicio kiu senrezerve akceptas ĉiujn antaŭajn revelaciojn kiel plenrajtajn kaj samtempe antaŭ-

vidas la nepran daŭrigon de tiu revelacia procezo ankaŭ en la estonto, kaj tiel do la enviciĝon de la propra religio en eternan ĉenon de egalrajtaj samfontaj diaj revelacioj. Tia pozicio faras la egalecon de ĉiuj religioj sia esenca principo, kaj laste vidas nur unusolan religion de Dio, renovigatan kaj adaptatan en diversaj epokoj kaj lokoj, al kiuj Dio siajn profetojn sendas. Per tia pozicio, interreligia disputado malebliĝas, kaj estas metata la fundamento por daŭra interreligia paco.

Tia teologio de progresanta revelacio kaj religia unueco, kvankam eble rudimente trovebla

ankaŭ aliloke, **estas miascie plene ellaborita nur en Bahaismo***.

Resume mi do vidas la rilatojn inter la religioj kiel etendiĝantajn inter du ekstremoj : unuflanke fundamentismo malakceptanta alian ol la propran religion kaj agrese disvastiganta tiun ĉi je la kosto de la aliaj, kaj aliflanke unuecismo rigardanta ĉiujn religiojn egalaj, kaj absorbanta ilin en ĉioampleksa, unueca koncepto de progresanta revelacio.

La vastan terenon inter ambaŭ ekstremoj kovras la plej diversaj formoj de pli aŭ malpli granda toleremo kaj komprenemo.

III – Limoj kaj senco de interreligia dialogo

La interreligia dialogo evidente devas halti antaŭ la demando pri la lasta vero. Se ni ĉi tie volus eltrovi kiu religio estas la plej bona kaj fine ĝusta, ĉe kiu troviĝas la lasta vero – se tion ni volus, ni venus nur al senfrukta, ja danĝera kaj damaĝa disputado.

Interreligia dialogo havas sian lokon ie inter ekskluda kaj maldialoga fundamentismo, kaj absorba unuecismo. Ĝi unuflanke bezonas reciprokajn respektadon kaj toleremon, kaj aliflanke devas ekskludi komparadon serĉe al la plej bona – tion rajtas fari ĉiu nur por si mem. La dialogo estas kondiĉata per la respekto antaŭ la alia tialia kia li/ŝi estas. Ia provo la alian ŝanĝi, eĉ konverti, tuj ĝin subfosas.

Ni, do, de la komenco, konsciu tion, kaj kuraĝe nin reciproke avertu se iu tiun fundamentan principon malatentas. Tio ja ne signifas ian limigon de la rajto sin mem esprimi, elmontri sian konvinkon, aŭ esplori kaj pridemandi la aliajn. Sed tuj kiam la propra starpunkto fariĝas ekskluda kaj agrese aŭ entira kaj okupa, ĝi, en medio de interreligia dialogo, perdas sian licon.

Se ni ĉi tie do nek volas nin reciproke fundamentisme ataki, nek rajtas nin reciproke konvinki kaj konverti, kio do povas esti la senco de nia renkontiĝo ? Miaopinie ĝi havas du gravajn taskojn : serĉi vojojn al komuna spirita spertado, kaj al komuna agado serve al paco, justo kaj bonfarto.

Per ambaŭ faroj fundamentismo estas malhelpata, kaj povas maksimumiĝi reciproka respekto kaj tolero.

Interese, ke ambaŭ tiujn celojn havis, miaopinie, ankaŭ **Zamenhof kun sia Homaranismo**. Laŭ mia kompreno Zamenhof estis konvinkita ke la homo laŭ sia naturo bezonas religion, respektive senti en sia koro "*la plej altan (...) ne kompreneblan Forton kiu estas la kaŭzo de la kaŭzoj en la mondo materia kaj morala*".

Kiel kredantoj ni ĉiuj same devus esti konvinkitaj pri **kiom grava estas spirita spertado**. Zamenhof tiurilate tamen ankaŭ ĝuste tre klare vidis la problemojn kiujn kaŭzas malsamaj tradicioj kaj ritoj ligitaj al preĝado, kontemplado kaj meditado. Ni, do, devas ĉi tie **diskuti lian proponon ellabori "neŭtrale-homajn festojn kaj morojn..."** ktp., respektive trovi iujn por ni akcepteblajn formojn.

Zamenhof ankaŭ konsciis ke apud la kontentigo de la animaj bezonoj de ĉiu unuopulo, la diversaj socioj kaj fine la tuta homaro bezonas ankaŭ tute konkretajn reformojn por meti firman fundamenton por daŭraj paco, justo kaj bonfarto. La plej granda servo kiun Zamenhof mem faris tiurilate estas sendube la internacia lingvo **Esperanto** kiu **ankaŭ en la Homaranismo**, kiel "*neŭtrale homa lingvo*", **restas kerna**.

(Zamenhof, krom lingvon, faris diversajn proponojn pri alinomado, ŝajne esperante ke tiel eblus krei alian, malŝovinisman konscion. Tiuj proponoj ŝajnas al mi hodiaŭ iom malrealismaj, se ne naivaj.)

Miaopinie, kiel esperantistoj ni devus nin demandi ĉi tie kiel ankaŭ ni povas, precipe en religiaj medioj, antaŭenigi la konscion pri la bezono de interlingvo, kaj eble la konkretan utiligon de Esperanto.

Bernhard Westerhoff

* Sed, ŝajnas al mi, la bahaanoj fakte ignoras la postajn revelaciojn kiel, ekzemple, tiun al Michel Potay en Arès (pri kiu F. Degoul aperigadas anoncojn sur la antaŭlasta paĝo de ĉiu numero) : ĉu bahaismo kapablis solvi la starigitan problemon "*de absorbo de la antaŭa kaj malaprobo de la posta*" ?

Se la revelacio estas ĉiam progresanta, ĝi certe jam multe progresis depost la morto de ilia profeto antaŭ pli ol unu jarcento : ĉu bahaanoj malfermiĝis al la novaj ? (Sed tiam ili ne plus estus bahaanoj sed Arès-pilgrimuloj aŭ simile...) (Notoj de la Red.)

La Serio pri Gilgameŝ

(13 linioj mankas aŭ estas difektitaj : Enkidu, sekvinte la hetajron Laĝojiga, atingis la ĉirkaŭaĵon de Uruk.)

Li esprimis
sian ĝojon !
(Sed) levante la okulojn,
li ekvidis
homon,
(kaj) li alparolis
la hetajron :
– "(Tiun) homon ci venigu,
Laĝojiga !
Kial
estas li ĉi tie ?
Al li volas mi demandi
lian nomon.
La hetajro
vokis (do) la homon,
(kiu) venis al Enkidu ;
tiu ĉi parolis al li :
– "Kien iras ci rapide,
viro ?
Kial
(tiu ĉi) vojaĵ' lacig[a] ?"
Kaj la viro,
malferminte sian buŝon,
alparolis
En[kidu-on] :
– "Oni min invitis
al "bofamilia festo"*.
(Tio estas) la kutimo
de la (ĉi-tieaj) homoj,
(tiel fin)elekti
la edzinojn.
Estas mi ŝargita
per manĝaĵoj,
per nutraĵoj plej bongustaj
destinitaj al la fest' bofamilia.
Por la reĝo
de Uruk la vojkruciĝoplana
estas malfermita la kurteno
(haltiganta la aliajn) homojn
ja rezerve
al nur ŝia edzo.
Por Gilgameŝ,
reĝo de Uruk la vojkruciĝoplana
estas malfermita la kurteno
(haltiganta la aliajn) homojn
ja rezerve
al nur ŝia edzo :
la edzinon tujan
fikas
li la tut-unua,
kaj nur poste ŝia edzo.

(Tia estas) la ordono
laŭ decido dia,
kaj ek de l'naskiĝo lia
tio estas agnoskita al li !"
Pro la parolado
de la viro
la vizaĝo de (Enkidu)
paliĝegis. (. . .)¹
Marŝis (do) [Enkidu
la unua],
(marŝis) Laĝojiga
post li.
Li alvenis
mezen de Uruk la vojkruciĝoplana,
(kaj) la homamaso
ĉirkaŭ lin ariĝis.
Se li haltis
kie ajn en strato
de Uruk la vojkruciĝoplana,
homoj
amasiĝis
kaj senfine babiladis
pri li :
– "Li similas Gilgameŝon
laŭprofile !
Pli malalta
laŭstature,
(sed tutsam)fortika
laŭmuskole !
[Tiu ĉi virego,
en la loko] de na[sk]iĝo [sia]
(devis) paŝti
sin per [herb'] printempa,
kaj la lakton
de l'sovaĝaj bestoj
suĉi !"
(Malgraŭ ke) en Uruk
la oferoj estis ja senĉesaj
(same kiel) la puriĝoj de la homoj,
estis decidata
< plia rit' aparta >
por honori tiun viron
kies trajtoj (. . .) :
– "Al Gilgameŝ, – (oni diris) –
(kvankam estas li) simila al diaĵo,
estis (do) donita
duoblulo !"

* Temas pri geedziĝo. Tiu ĉi homo do estas parenco aŭ amiko de la edziniĝontino, kiu estas akceptota en la domon de sia baldaŭa edzo.

(Dume) la amordiina nokta lito
estis pretigita (por la geedziĝo) ;
kaj Gilgameŝ
ku[n la tuja edziniĝontino]
devis "renkon[tiĝi]"
dum la nokto.
Do ekmoviĝinte
(kaj jam alveninte tien),
[Enkidu] senmo[ve staris]
en la strato,
bar[o sur la v]ojo de Gilgameŝ. (. . .) ²

[Enkidu'] eksturmis
kontraŭ (Gilgameŝon),
kaj sur la ĉefplaco
ili vidalvide frontis :
Enkidu', barante la pordegon
perpiede,
malebligis al Gilgameŝ
la eniron.
Ili kaptis unu la alian ;
kiel virbovegoj,
kunbatiĝis
frakasante
la pordfostojn
kaj ekstremit(gante)
eĉ la murojn :
Gilgameŝo kaj Enkidu
kaptis unu la alian ;
kiel virbovegoj,
kunbatiĝis
frakasante
la pordfostojn
kaj ekstremit(gante)
eĉ la murojn !
Kiam Gilgameŝ' fleksiĝis
– kun piedoj (tamen)
sur la ter' (fiksitaj firme) – ,
lia kolerego falis,
kaj li cedis.

Kiam estis li cedinta,
Enkidu' lin alparolis :
– "(Tio estas ul') escepta
(kiun ja) patrino cia
naskis,
ŝi, diin' Ninsuna,
Bubelin'-de-la-gregejoj !
Cia kap' superas
(ĉiujn) edzojn !
La reĝecon
super la popoloj
(dio) Enlil
atribuis al ci !"

(Fino de la) dua tabuleto (de la verko titolita :
"Escepta [monarko]"). Ducent kvardek (versoj).

(**Estas sekvo sur tabuleto konservata ĉe la universitato
en Yale ; la 12 unuaj linioj, kvazaŭ tute malaperintaj,
versajne entenis diskuton inter la du luktintoj.*)

– "[Kia]l (do) ci volis
ag[i ti]el ?" (. . .) ³

(Tiam)
ili sin brakumis
kaj akcept[is]
reciprokan amikecon.
(Poste) ili interbabiladis. (. . .)

(*Mankas 24 linioj. Mi do transiras al la Nineva Versio
kie Gilgameŝ prezentas Enkidu-on al sia patrino :*)

– "Estas li la [fo]rta [de la lando],
[la valora] !
[samfortika kiel bl]oko [el ĉielo],
alt-[statura kiel pinto de murego] !" ¹
La patrino de Gilgameŝ,
[malferminte sian] bu[ŝon],
[ekparolis], kaj al [sia filo] alparolis –
la di'-bubalin' Nin[suna,
malferminte sian buŝon],
[ekparolis, kaj al Gilgameŝo alparolis] :

– "Filo mia (...)
(Enkidu') acide plendis
[pri konduto cia (?)]." (. . .) ⁴

– "(Certe) li, staranta ĉe la pordo
de la [edza do]mo,
akre plendis
[pri konduto mia (?)].
(Tamen tiu ĉi) Enkidu havis
– ve ! – nek patron nek patrinon ;
liaj haroj tutlibere (flirtis)
[sur la ŝultroj (?)] :
li, naskita en la stepo,
[estis edukata de neniuj (?)]."

Kiam, ĉeestanta ja, Enkidu
aŭ[dis tiujn ĉi parolojn],
restis li senmova,
tut-ensigita,
kun okuloj plenaj
[de larmegoj],
kun senfortaj brakoj,
(kaj) [sen kia ajn] vigleco !
(Tiam) ili sin brakumis
(...) ;
kaj iliajn manojn plektis. (. . .)

(*La resto jam estas enkonduko al la tria tabuleto :
...do, sekvote ?*)

- 1/ Mankas 9 lin., priskribantaj la koleron de Enkidu ?
- 2/ Mankas 8 lin. : la herooj pretiĝantaj por la lukto ?
- 3/ El 5 linioj restas nur kelkaj nekompreneblaj vortoj.
- 4/ Mankas 2 lin. : paroloj de Gilgameŝ por defendi aŭ senkulpigi Enkiduon pri kion ŝi ŝajnis riproĉi al tiu ĉi ?

Praga prelego* : *Jogo kaj sano*

de Christian Lavarenne

Enkonduko

La titotlo de nia IRKE-a temo, "*Integreco de la sano fizika, psika kaj spirita*", estas formulita laŭ okcidenta vidmaniero pri la homo, kiu dividas ĝin en tri partojn : fizika, psika kaj spirita. Tia divido ekzistas en la hebrea kun la nomoj *bâsâr* : karno, korpo ; *nefeš* : spiro, vivo, animo sed ankaŭ koro, sento, deziro, volo, penso ; kaj *rûaĥ* : spiro, kolero, aero, vento, vivo, animo, pasio, kuraĝo, volo, sed ĉefe spirito.

Ĝi ekzistas en la greka kun nomoj *to sôma* : korpo, *he psuĥe*, animo kaj *to pneŭma*, spirito. Tiuj vortoj ebligas vortludon pro simileco inter *sôma* kaj *sêma* (tombo) : "la korpo estas la tombo de la spirito", kiu devas liberiĝi el ĝi.

Ankaŭ en la latina ekzistas *corpus*, korpo ; *anima*, animo ; kaj *spiritus*, spirito (kvankam plie ekzistas *animus*, sed ni ne insistu pri tio ĉi). Kaj do tiun dividon kompreneble heredis esperanto.

En sanskrito malsame, anstataŭ tri partoj estas kvin *koŝa*, vorto ofte maltaŭge tradukita per korpoj dum temas jam pli ekzakte pri ujoj unuj en la aliaj kiel rusaj pupoj. Sed tio estas nur spaca bildigo por konkretigi ion malfacile koncepteblan. Same kiel oni diras, ekzemple, ke Dio *loĝas en la koro de la homo*.

La homa konsisto

Do ni provu kompreni kiaj estas tiuj kvin homaj ujoj. Pri la unua ne estas problemoj. Ĝi estas *anna-maya koŝa* : la ujo farita el manĝaĵo, do la fizika korpo kiun oni devas preskaŭ ĉiutage nutri por ne morti.

La dua ujo estas *prâna-maya¹ koŝa*, farita el *prâna*, kio estas la spiro, la principo de la vivo, energio, povo ; kaj multaj malsanoj venas el malforteco de tiu ĉi.

La tria ujo, *mano-maya koŝa*, estas farita el *manas*, kio estas la menso (el la sama hindeŭropa radiko *MEN* : pensi). Ĉar kelkfoje estas malfacile scii kion ekzakte signifas abstrakta vorto, mi klarigu ke temas tutsimple pri la fakto ke oni parolas : aŭ vere, kiel mi mem nun al vi, aŭ interne al si mem aŭ al neĉeestanta persono aŭ eĉ personigita aĵo, aŭ al Dio. Kutime tiu vortiga aktiveco neniam ĉesas krom eble kiam oni dormas aŭ svenas. Tiu konsistaĵo de la homa tuto estas do ege grava, kaj multaj malsanoj rilatas al ĝi : frenezo, manioj, demenco, deliroj, psikozo, ktp.

La kvara ujo estas *vijñâna-maya koŝa*. *Vijñâna* estas, diference de la *manas* kiu koncernas nur la racian inteligentecon, la supera kono, kiu rilatas kun la absoluto. Jen citaĵo kiu espereble klarigos al vi la diferencon inter ambaŭ :

" *Manas (la menso) povas nur klasifiki, ĝeneraligi, malkovri rilatojn inter objektoj, kaj atenti pri harmonioj (...)* Klera homo kies menso estas bone trejnita kaj logike formita povas esti tute en obskuro pri la Unua Fonto de l' universo, dum kamparano, al kiu la filozofiaj rezonadoj ŝajnas kiel enigmoj, povas havi lumigitan intelekton (*vijñâna*) kiu facile perceptas la nevideblajn misterojn de la Spirito." ²

Do temas pri ia intuicia funkcio de la interna organo.

Fine la kvina ujo, do la plej interne ligita kun la esenco mem de homo, estas *ânanda-maya koŝa* : ĝi estas farita el beateco, el pura ĝojo. Kaj persone mi ege ŝatas ke la hindoj rigardas kiel plej profundan esencon de la homo, la ĝojon. Ĉio estas nur aldonajoj al tiu ĉi esenca ĝojo : tial, nemalsana homo sen apartaj zorgoj estas nature ĝoja.

La esenco de la homo

Sed ni parolis pri kvin ujoj. Kion do ili entenas ? la "atmon" aŭ "atmanon" : tiuj du PIV-aj vortoj fakte estas malsamaj transskriboj de ununura sanskrita vorto *âtman*³.

Laŭ PIV "atmo" estus la individua animo, kaj "atmano" (mi citas:) "*la kosma animo, la spirita medio en kiu baniĝas la fenomenaj universo*". Laŭ mi tiu ĉi lasta difino pli bone respondas al la vorto *brahman*, mistransskribita "bramo"⁴.

âtman estas laŭvorte tradukebla per *mem*, aŭ substantive *memo*. Ĝi estas la esenco de la homo, la homo *mem* ĉar ĉio kion ni priskribis ĝis nun estas nur ĝiaj ujoj. Kaj tiu *mem* de la homo iel estas identa kun la *brahman* la "transcenda esenco kaj unuo de la universo" (laŭ la dua difino de PIV) ; kaj do ĉiuj homoj estas esence identaj : ili havas ne nur similan sed ekzakte la saman esencon kiu ankaŭ estas la esenco mem de la universo, ĉar ĉio estas unu : la diferencoj estas nur imagaj, almenaŭ laŭ la *advaita*-vedanto.

Kio do distingas unu homon disde la aliaj ? La erara sento de "mi"-eco (*ahamkara*), kiun ni pli kutime nomas konscio, kaj kiu apartigas nin disde la tuta resto de la mondo.

Se tiu *mi-sento* malgrandiĝas, la problemoj samgrade malgrandiĝas ĝis tuta malapero, ĉar se ne plu estas mi, kiu povos havi problemojn?

La klasika jogo de Patañjali

Jen do la celo de joga: unuiĝi unue kun si mem, kaj ankaŭ kun la tuta mondo (ĉar nenio povas ekzisti ekster tiu *unu* kiu estas la senlima absoluto) per haltigo de la "*turniĝoj de la menso*", t.e. la pensoj.

Kiel tio povas efiki sur la sanon? Nu, multaj malsanoj venas de konfliktoj kaŭzitaj de la menso. Pruvo estas ke homoj estas multe pli ofte malsanaj ol bestoj. Do kiel fariĝi pli sana? Per joga. Kaj kio estas joga? Multe pli ol kion la okcidentuloj plejofte imagas (kion la hindoj nomas *hatha* joga). Jen priskribeto de la okobla joga de Patañjali, kies *Jogosutro* estas la skriba fonto de la tuta literaturo pri joga.

Oni tuj komprenos ke joga ne konsistas el nuraj fizikaj ekzercoj ĉar la du unuaj ŝtupoj havas nenian rilaton kun tio. Temas pri *yama* kaj *niyama*. Antaŭ ol detaliĝi ambaŭ ni precizigu ke iliaj reguloj tute ne estas moralaj reguloj ĉar ĉi tie ne temas pri etiko: la celo estas nur kiel trankviligi, pacigi la menson.

Memregado (*yama*)

Por tio necesas observi kvin regulojn. *Ahimsa*, taŭge transskribita en PIV ahimso, kaj tie difinita: "Principo laŭ kiu homo devas absolute deteni sin mortigi, vundi aŭ eĉ malutili iun ajn ekzistantajn" (nur la PIV-a ekzemplo estas forigenda). Sed ni atentigu ke tiu ahimso devas esti ne nur aga sed ankaŭ kaj ĉefe mensa.

La Ĝajnoj aŭ Ĝinanoj multe insistas pri tiu ĉi punkto. Kiel ekzemplon mi povas rapide rakonti al vi ke samideano ekinstruis esperanton al kelkaj ĝajnaj monaĥinoj, antaŭ jam kelkaj jaroj; kaj li montris al ili vortaron; sed kiam ili trovis en ĝi la vorton *viando*, kies koncepto postulas do pensi pri mortigado de bestoj, ili kvazaŭ rifuzis plulerni esperanton kiu akceptas vortigi tiajn abomenindaĵojn pri kiu ili ne rajtas paroli aŭ eĉ pensi.

(**Ahimso do postulas esti vegetarano**, kio cetere estas bonega por la sano.)

Sed se la ĝajnoj, kiuj estas religiaj kaj ege spiritualaj homoj, tiras ahimson al morala sinteno, se Gandhi tiris ĝin al politika utileco, joga ĝin tiras al propra mensa utileco: se oni provas ne esti agresema, la menso paciĝas kaj la aliaj lasas nin trankvilaj, kion postulas joga trejniĝo.

Oni same devas kompreni *satya*: la vero, kiun oni devas provi ĉiam diri, ne pro moralo sed por ne komplikigi al si la vivon. Sed por esti vere

vera, parolo devas esti ne nur vera sed ankaŭ ne noci al vivantaj estaĵoj. (Tio ĉi kongruas kun ahimso).

Same pri *a-steya*, ne-ŝtelo: ne tiom por ne malutili al aliaj ol por ne okazigi al si mem maltrankvilon, ekzemple pro timo esti malkovrita ktp. Kaj ne-ŝtelo (*asteya*) larĝigis sian sencon ĝis ne-deziro ŝteli.

La kvara regulo, *brahmaĉarya*, etimologie signifas vivi laŭ la *brahman* aŭ Dio, aŭ okupiĝi pri ĝi. Plejofte la vorto celas la vivon de juna brahmano kiu edukiĝas ĉe sia guruo. Sed la senco iom post iom ŝanĝiĝis al ĉasteco. La klarigo de tiu grava senco-evoluo, mi supozas, estas ke tiu kiu havas aman rilaton kun iu, iamaniere vivas sub lia aŭ ŝia influo anstataŭ tiu de Dio?

Fine la kvina regulo de memregado estas ne-kapto, ankaŭ tradukita en esperanton "rifuzo de neutilaj posedaĵoj". (Sed *aparigraha* ankaŭ signifas senedzina aŭ sen servistoj: ĉu tio signifas ke tiam edzino estis kvazaŭ servisto, kaj ke tiaj homoj estis rigardataj kiel nuraj posedaĵoj? mi esperas ke ne!)

Vyâsa, la plej grava komentariisto de Patañjali klarigas ke tio venas de la "*kompreno de la malavantaĝoj rilataj al gajno, konservado, perdo de objektoj, al ligiteco al ili, kaj al ilia damaĝo*". *Aparigraha* do estas emo al neriĉa vivo ĉar riĉeco ĉiam komplikigas la vivon, donante pli kaj pli da posedaĵoj mastrumendaj kaj do samtempe pli kaj pli da zorgoj (ekzemple pri borsaj akcioj ktp.)

Disciplino (*niyama*)

Post tiuj kvin reguloj de memregado, venas kvin reguloj de disciplino. Estas unue la pureco (*śauca*), korpa kaj mensa.

Due la kontenteco (*santoṣa*), pri kiu Zamenhof proverbe kaj prave diris: "*kontentulo estas pli feliĉa ol homo plej riĉa*".

Trie, la asketado (*tapas*), por iom post iom fariĝi malpli sentema pri la malaj paroj: varmo/malvarmo, sato/malsato, soifo/malsoifo, plezuro/doloro, ktp. Oni ankaŭ povas voti ne paroli dum fiksita tempo (ofte dekdu jarojn!), ktp...

Kvare, la studado (*svādhyāya*), t.e. legado de skriboj rilataj al la liberiĝo (kaj ankaŭ ripetado de la mantro *om*).

Kaj kvine, la dediĉo al la Sinjoro (*Īśvara*): tiel oni evitas droni en egoismon agante ne por si mem sed "por Dio". Tiu mencio de persona dio estas la ununura en la tuta teksto de la *yogasûtra* kiu, krom tio, povus esti akceptebla de ateisto.



Originala akvaforto de Martine Relyveld

Āsana kaj prānāyāma

La observado de tiuj dek reguloj de mem-regado kaj disciplino estas necesa por praktiki la aliajn ŝtupojn de jogo. Jogo ne povas plene efiki sen ili. Nur poste venas *āsana*, la pozicioj, el kiuj la plej fama estas *padmāsana*, la lotusa pozicio.

Sed la difino de *āsana* estas ke ĝi estu stabila kaj agrabla : do tute ne temas pri la memtorturado kiun spertas tro fervoraj okcidentaj komencantoj. Pli bone por ili tutsimple sidi sur la rando de seĝo tiel ke la dorso estu komforte rekta kaj vertikala.

El la *hatha* jogo, la fizika jogo, Patañjali postulas nur tion por pasi al *prānāyāma*, la regado de la spirado ; ĉar tute senmova korpo kaj trankvila spirado iom post iom nature malrapidiĝinta havas gravan efikon sur la menson kiu tiel jam emas paciĝi. Se oni observas tiujn praktikadojn oni jam forigis la kaŭzojn de preskaŭ ĉiuj malsanoj danke al fizika kaj mensa ekvilibro. La kvar superaj ŝtupoj ne rekte rilatas kun sano, do mi rapide mencias ĝin.

Meditado

Pratyāhāra estas neatento al la ekstero. Nenio eksterordinara. Ĉiu el vi certe spertis ĝin atentege legante interesege libron : via patrino aŭ edzino subite venas riproĉeti al vi : kion do vi faras ? jam de kvin minutoj mi vokadas vin por veni vespermanĝi... – Ĉu vere ? Pardonu min sed mi tute ne aŭdis vin...

Dhāraṇa estas koncentriĝo. Se vi provis solvi matematikan problemon ...aŭ traduki malfacilan tekston en esperanton, certe vi praktikis *dhāraṇa*. Kvankam oni ankaŭ povas trejniĝi fikse rigardante objekton ktp.

Dhyāna estas kontemplado, la unua frukto de *dhāraṇa*. Oni ne plu bezonas aktive koncentriĝi forigante pensojn eksterajn al sia atentopunkto : ideojn tute senrilatajn aŭ sentojn. La atento estas perfekta kaj la punkto pri kiu oni okupiĝas daŭre kaj jam spontanee kaptas tiun atenton : ekzemple interesa filmo aŭ belega pejzaĝo aŭ koncerto ktp.

Kaj *samādhi*, la absorbiĝo estas nur pli alta grado : la kontemplado de belega sunsubiro tiom kaptas la atenton ke post nemezurebla tempo oni subite rekonscias pri si mem, pri la fakto ke oni kontemplanis tiun sunsubiron, kaj pri la resto de la mondo ĉar dum momento oni ĉion forgesis, ĝis sin mem ! Oni sentas kvazaŭ tiu momento estis eterna (ekstertempo), kvazaŭ dum ĝi nenio kaj neniu plu ekzistis, eĉ ne ni mem.

Tiun nememoreblan sperton (ĉar estis nenio kaj neniu por memori) oni tamen neniam forgesas kiel eksterordinaran okazaĵon al kiu oni kelkfoje sopiras : kvazaŭ oni eniris en la dian senvortan harmonion, kvazaŭ oni mallonge spertis la perditan paradizon kaj iom da eterneco...

...kaj la sano ?

Tio estis rapida priskribo de la klasika okobla jogo de Patañjali. Nun, kiel resaniĝi de multaj malsanetoj aŭ, pli bone, preventi ilin ? Plie de ĉio jam dirita, per refortikigo de la "energio" (*prāna*). Oni sidu kun rekta kaj vertikala vertebraro (oni devas imagi siajn harojn suprentirataj kaj provi sekvi tiun suprenan movon, kvazaŭ por eviti la doloron de tiu tirado, sed sen streĉiĝo) ; kaj oni regule, malrapide kaj dolĉe spiru.

Oni povas ekzemple ĉiutage elspiri kaj enspiri unufoje tra nur unu, sama, naztruo, ŝtopante la alian per premeto de fingro ; kaj poste elspiri kaj enspiri tra la alia ; kaj daŭrigi tian alternan spiradon dum pluraj minutoj (ekzemple 12 ciklojn de tiu ĉi duobla spiro por komenci) : spontanee la spirado iomete malrapidiĝos mem kaj la menso trankviliĝos. Kiam oni poste stariĝas oni sentas sin kaj malstreĉigita kaj plena de energio. □

* Antaŭ cent-kapa publiko, dum la tradicia *Inter-Religia Kunveno Esperantista* enkadre de la lasta UK. La preleginto intencis paroli ankaŭ pri tantrismo, mal-longe, sed jam ne plu estis sufiĉe da tempo...

1/ Malsama ol *prānāyāma* (vidu malsupre).

2/ Sw. Brahmabandhu Upādhyāy, *Sophia*, 16-6-1900.

3/ En la dua transskribo oni nur *aldonis* la o-finaĵon, kaj en la unua, ĉar la subjekta kazo estas *ātma*, aliaj (aŭ la samaj vortfaristoj ?) forigis la finan *a* kaj *anstaŭigis* ĝin per la esperanta o-finaĵo.

4/ Ne estas la loko kaj tempo, ĉi tie paroli pri tiu korektenda miso : "En E-o la aspiracio estas montrata de la litero *h*" (PIV). Nu oni ne rajtas kripligi vortojn...

Religia situacio en

La usona Ŝtat-departemento verkis, la 22-an de julio 1997, raporton pri la persekutadoj de kristanoj en 78 landoj, inkluzive Ĉinion. Jen eltiraĵoj publikigitaj, la sekvan tagon, de la *Monda pri-Tibeta Ret-Novaĵoj* kaj afable senditaj de Guido Gentile (*E-Radikala Asocio*), kiu ricevis ilin pere de la itala multlingva komunik-sistemo *Agora*. (Fakte ni devis elekti el la surdiskeda ekvivalento de preskaŭ 70 paĝoj da informoj pri Tibeto kaj Ĉinio !)

La konstitucio deklaras ke la civitanoj "*ĝuas liberecon de religia kredo*". Tamen la registaro de Ĉinio provis limigi ĉiun realan religian praktikon al registar-permesitaj religiaj organizoj kaj registritaj kultlokoj. Praktike tiu ĉi klopodado estis malsamgrade realigata, kaj en iu areoj nepermesitaj grupoj floris. Depost 1980 kaj precipe en la ĵusaj jaroj, religiaj grupoj, kaj registritaj kaj neregistritaj, tamen rapide kreskis, kvankam la registaro klopodas certigi ke ĝi kontrolas la religion.

Dekreto de la Ŝtata Konsilio subskribita en 1994 ordonis ke ĉiuj religiaj grupoj registriĝu ĉe la registara buroo de religiaj aferoj kaj venu sub la kontrolon de oficialaj religiaj organizoj.

Iuj religiaj grupoj registriĝis dum al aliaj la registriĝo estis rifuzata kaj aliaj ne petis registriĝon. Multaj grupoj malemis obei pro principa kontraŭstaro al ŝtata kontrolo de la religio, nevolo limigi siajn aktivecojn (...) Ili timas malbonajn konsekvencojn se ili rivelas, kiel postulate, la nomojn kaj adresojn de la membroj (...)

Lin Xiangao, ankaŭ konata sub la nomo Samuel Lam, 71-jara, estas respondeculo de sendependa kristana kultloko en Ĝuangzhu (provinco Ĝuangdong), kiu havas ĉ. 1600 membrojn. Tiu homo entute restadis pli ol 20 jarojn en prizono. Lia lasta restado okazis en decembro 1995, dum mallonga tempo. Li poste deklaris: "*Lastfoje kiam ili venis (...) ili venigis min al la administracia konstruaĵo kaj poste ili revenis kaj forportis 40 skatolojn da biblio kaj religiaj libroj*". La policistoj poste fermis la kultlokon kaj forprenis adresaron kiun ili poste uzis por viziti multajn fidelulojn. La policistoj diris al ili ke ili ne plu iru al la kulto kaj minacis ke ili perdigos al ili ilian laboron, ilian salajron kaj ilian pension se ili ne obeos.

(Amnestio Internacia, *Ĉinio: Subpremado kontraŭ la religiaj grupoj*, oktobro 1996 (dok. "CA 061"), p. 3.)

➔ Gvidataj de centra politikdirektivo (okt. 1996), kiu lanĉis nacian kampanjon por forigi nepermesitajn religiajn grupojn kaj sociajn organizojn, la ĉinaj aŭtoritatoj en iuj areoj faris fortajn klopodojn por malaperigi la aktivadojn de neregistritaj katolikaj kaj protestantaj movadoj en 1996-1997. ➔

➔ Ili invadis kaj fermis plurajn centojn da hejmpreĝejaj grupoj, multaj kun signifaj membraroj, posedaĵoj kaj financaj rimedoj. Lokaj aŭtoritatoj, plenumante tiun ĉi kampanjon, uzis minacojn, detruon de posedaĵoj, eltrudon de "monpunoj", pride-mandadon, malliberigon kaj kondamnon al reedukado. Iuj gvidantoj de tiaj grupoj estis malliberigataj por longaj enketoj kaj iuj estis batataj (...)

Nun kvar katolikaj "subteraj" episkopoj estas inter la multaj kristanoj kiuj restas enprizonigitaj aŭ malliberigitaj, aŭ kies lokitecoj estas nekonataj. Katolikaj pastroj, la episkopo M-ro Jozefo Fan Zhongliang kaj Rev. Zen Caijun [Kajĝun ?] estis submetataj al priserĉadoj kaj kaptoj de religiaĵoj kaj aliaj posedaĵoj en 1997.

Du konkurencaj katolikaj eklezioj

La neregistrita Vatikan-filia katolika eklezio asertas ke ĝia membraro estas multe pli granda ol la kvar milionoj da homoj registritaj ĉe la oficiala katolika eklezio (kiu ne rekonas la aŭtoritaton de la Papo), kvankam precizaj ciferoj ne haveblas.

En aprilo 1996 grupo da katolikoj de la kantono [?] Xia (en provinco Anhuĵ) estis arestataj kaj multaj el ili draŝataj post kiam ili deponis peticion ĉe la lokaj aŭtoritatoj por ke estu redonataj la posedaĵoj de ilia eklezio. En majo 1996, 5000 soldatoj, akompanataj de blenditaj veturiloj kaj helikopteroj, malebligis katolikojn partopreni en la ĉiujara pilgrimado al Dong Lu. Centoj da miloj da katolikoj estis kuniĝintaj por tiu pilgrimado. La interveno de la armeo rezultigis areston de certa nombro da katolikaj pastroj kaj fideluloj. Aliaj katolikoj estis metataj en gardatajn restaĵojn aŭ submetataj al gravaj [liber]restriktoj.

(Amnestio Internacia, samloke.)

Registaraj oficialuloj taksas ke estas ĉ. dek kvin milionoj da protestantoj en Ĉinio; aliaj taksoj indikas ke ĉ. dek milionoj da homoj apartenas al la oficiala eklezio, dum eble tiom multe kiom trioble ĝis sepoble pli kultas en hejmpreĝejoj kiuj estas sendependaj de la registara kontrolo.

Dum oficiale registritaj grupoj ofertas kreskantan kampon de servoj al siaj membroj kaj siaj komunumoj, ili estas submetataj al registara gvi-

Ĉinio

dado kaj havas limojn en siaj doktrinaj kaj instruaj aktivecoj. Biblioĵoj estas presataj en kreskantaj nombroj : tri miloj en 1996 (unu miliono en 1995), kaj distribuataj de oficialaj organizoj en kunlaborado kun eksterlandaj grupoj (...)

Oficialuloj de la komunista partio asertas ke partianeco kaj religia kredo estas neakordigeblaj. Tio ĉi donas gravajn limigojn al religiaj kredantoj tial ke partianeco estas postulata por preskaŭ ĉiuj altaj postenoj en la registaro kaj la entreprenoj posedataj de la ŝtato. Tiu ĉi postulo estas malsamgrade aplikata ; laŭ registara taksado je 1995, 20 % el la komunistpartianoj partoprenas en ia religia aktiveco.

Aliaj religioj

(...) Kreskanta registara zorgo pri potenciala efiko de sendependistaj movadoj ankaŭ kondukis al restriktado de la religia libereco de nekristanaj kredantoj (...) En la majoritate islama Memstara Regiono Xinjiang, la registaro plifortigis sian kontrolon pri la religiaj aktivecoj responde al sendependista bomba kampanjo. Multaj moskeoj estis fermataj aŭ **detruataj**, nesankciitaj religiaj kursoj estis fermataj kaj iuj lokaj oficialuloj estis eksigataj (...)

La [usona] vicprezidanto Gore diskutis pri la usonaj zorgoj pri restriktado en religia libereco kun gravaj registaraj oficialuloj dum sia vojaĝo al Pekino en marto 1997 (...) □

Ĉina respondo

Dum kutima novaĵ-sciigado de la ministrejo de la Aferoj Eksterlandaj*, la proparolanto Tang Guoqiang repuŝis la kritikon. Li diras ke la konstitucio de Ĉinio protektas [*protects*] la religian liberecon de la ĉinaj civitanoj, kaj ke estas pli ol cent milionoj da religiaj homoj en Ĉinio. Li daŭrigis dirante ke ili subtenas la religian politikon de la ĉina registaro. [*Do tiuj cent milionoj estas verŝajne anoj de oficiale registritaj grupoj.*] □

(Gil Butler, korespondanto de *Voice of America*, 24-7)


* De 1996 tiuj internaciaj novaĵ-sciigadoj ne plu estas en la angla sed en la ĉina (laŭ *El Popola Ĉinio*).

Tibeto

Dum sia kunveno kun la Dalai-Lamao en aprilo 1997, la prezidanto Clinton kaj la vicprezidanto Gore esprimis sian daŭran zorgon pri la situacio de la tibeta popolo, inkluzive la necesecon **protekti** [*preserve*] la **religian liberecon** de la tibetaj budhistoj. □ (*Ŝtatdepartementa raporto*)

Mongolio : nova sekto (mis)uzas esperanton

S-ro Tsedendambyin BOLD (naskita en 1950 en Ulanbatoro), post diplomo pri la angla kaj esperanto ĉe la mongola ŝtata universitato en 1973, komencis krei la *Ya-zu*, azian internacian lingvon bazitan sur la mongola, ĉina, korea, japana kaj vejtnama. Li ankaŭ fondis la "*Ya-zu[-an] ekstra-seancistan* [?] *templon de la scienca nova religio*". Sur la titolpaĝo de sia 53-paĝa *Ya-zu*-angla-esperanta-mongola frazlibreto li estas (nekonvinke) fotita levitanta en la lotusa pozicio.



Estimata prezidanto! [Mi] salutas vin el Ulanbatoro.

Bonvolu vi organizi Ya-zu Esperanto-Ekstraseancistan societon ĉe via asocio. Celo : *Ya-zu[-aj]* Esperanto-ekstraseancistoj disvastigos Esperanton per la nova *Ya-zu[a]* religio. *Ya-zu[a]* religio donos sciojn de la orienta filozofio, akupunkturo kaj astrologio al la Esperantistoj.


Ya-zu[-aj] ekstraseancistaj kongresoj estos en 10-13 julio en 1997 [en] Ulanbatoro. Se vi volas partopreni mi invitos vin.

8-5-1997, *Ya-zu[-an]* kreinto Ts. Bold

(✉ Ulanbator Post-Office 30, pillar-box 20, Mongolio
Faks. +976-132 02 10 ☎ 379-123 📧 yazu@magicnet.mn)

Respondo : Dankon pro la sendaĵo kaj invito kiun mi, ASISTI-sekretario (ne prezidanto), bedaŭrinde ne povis akcepti. Sed bonvolu sendi raporton. Antaŭdankon.

Christian Lavarenne



Granda Unueca Kredo

Oferu al vivintoj de diversaj nacioj,
donacu al vivantoj sur la planedo,
heredu la vivontoj en la kosmo.

Enkonduko

1. Granda unueca kredo (mallongigo : GUKo) estas vero el GUKo ; GUKo – Granda Ununura Dio – estas kuko de vivo.

2. Mi verkas en Esperanto por trasemi semon de amo : Esperantistoj, bonvolu traduki *Granda Unueca Kredo* en vian konatan lingvon ! Amen.

3. GUKo ne nur estas la nomo de ĉi-libro, sed ĉefe estas simbolo de niaj dioj. Vera kono pri niaj dioj devus baziĝi sur la teorio de Granda unueca kredo, kiel ni huras : "GUKo". La nomo de GUKo estas neblasfemenda ; la libro estas netuŝenda.

4. Jes, mi verkas por la putino ! Jes, mi verkas por la murdisto kaj la teroristo ! Jes, mi verkas por la ŝtata prezidanto kaj la fabrika laboristo ! Mi verkas por ĉiu kiu foje larmas, foje doloras. Mi vualu la pro teruro larĝe malfermitajn okulojn de la Historia Diino ; mi elviŝu la sangon sur la vizaĝo de la Historia Diino, kiu estas bela kaj aminda !

5. En GUKo ne troviĝas teologo, nek troviĝas pastro de GUKo. Ĉiu egalas antaŭ GUKo. Tra la lingvo, per via koro, komprenu ĝin ! Amen.

6. Kara amiketo, GUKo parolas pri rakonto de amo. Sur la genuoj de via patro vi eble ne tute komprenus eldiraĵon de via patro, sed vi povus klare aŭdi la batadon de la senlaca varma koro ! Amen.

7. Karaj gemaikoj, vivu laŭ la himno de la kosmo : GUKo !

8. GUKo ne aspektas salato de diversaj religioj kaj ideoj, sed ĝi baziĝas sur miljara frukto de homa civilizacio, ĉu en arto, ĉu en scienco. Amen.

9. Mi ne plu laŭdas amon, kiel la antikva poeto kaj la moderna romantikisto. Prenu ĝin kiel la dion de vivo, reliefus ĝia graco en la fiziko. Kiam vi ĝuus belon per ritmo en poemo, bonvolu ricevi feliĉon per amo en kosmo. Amen.

10. Ili figurigis sian kredon jene : ekster malgranda cirklo estas granda cirklo ; en la malgranda cirklo estas skribite *DIO* ; en la granda estas nomoj de diversaj religioj : Judaismo, Budhismo, Kristanismo... ; sub tiu figuro estas reklameca vorto : "*La religio de la tria jarmilo (...) ĝi estas tute scienca, la tuta filozofio (...)*".

– GUKo ne estas tia, ĝi estas integra tuto !

11. La ondego de la maro estu mia eterna voĉo. Neniu povus kovri ĝin. Tra la malluma spaco laŭtempe resonas : "GUKo... GUKo... GUKo..."

12. En GUKo troviĝus nova vortaro, nome :
Patro signifas protekton kaj braven, ne regadon ;
patrino signifas amon, ne obeemon ;
soldato signifas pacon, ne morton ;
lernado signifas kreadon, ne recitadon ;
prezidanto signifas servadon al la popolo,
ne privilegion ;
morto signifas vojaĝon al la sino de GUKo,
ne pereon ;
vivo signifas ĝui la vivon, kiu estas suno de apero ;
seksumado signifas korpan esprimadon de amoro,
ne bestecon ;
meditado signifas ekzercon de la animo ;
ter-globo signifas puran vilaĝon,
en kiu troviĝus via hejmo ;
tigro kaj rozo signifas amikojn en la naturo ;
nacio signifas apartan kulturon,
ne transformiĝon de naziismo ;
ŝtato signifas administran unuon en nova mondo ;
novaĵo signifas informon de apero,
ne ilon de propagando ;
tekniko signifas bonaĵon,
ne minacon kontraŭ la homo ;
libero signifas nervon de evoluo, ne senbride agi !
.....

13. GUKo, la plej hela stelo en la dezerta kosmo ! Via lumo lumigas ĉiun angulon en la mondo ; la demono sub via lumo fariĝu pli okulfrapa ! Sur la malgranda planedo mi atente semas semon de pura kredo, la semo ĝermis, kaj floras... Amen.

14. Je la nomo de GUKo, vi ĉiam vivas en vi, por vi kaj per vi. Via instruisto, viaj gepatroj, viaj kunuloj ja ne rajtas entrudiĝi en vian vivon. Ilia vorto porĉiam restas konsilo. GUKo benu nin !

15. Je la nomo de GUKo, mi donu al vi lingvon por montri aperon en la kosmo. Ne prenu ĝin kiel unikan donacon al la homo, ĉar ĉiu posedas sian lingvon. Per tio la amo aperu ! Amen.

16. Al la GUKistoj : ĉie en la mondo estas virgatero, semu amon sur tiun ! Amen.


17. Je la nomo de GUKo, mi lasu vin verki la libron al la homo pro tio : ĉiun tagon multaj homoj mortas, ne pro malsano en la korpo, sed pro doloro kaj soleco en la animo. La libro fariĝos evangelio al ĉiuj sur la tero ! Amen.

(Daŭrigote)

Jebumo (Ĉinio)



Konscienc-obĵetado



Internacia Konvencio pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj Ĝenerala Komentario de la Homrajta Komitato (fino)

[11.] Multaj individuoj pretendis la rajton rifuzi plenumi militservon (pro konscienc-obĵeto), apoge dirante ke ilia rajto devenas de iliaj liberecoj laŭ la artikolo 18. Responde al tiaj pretendoj, kreskanta nombro da Ŝtatoj, en siaj leĝoj, liberigis de deviga militservo civitanojn kiuj sincere havas religiajn aŭ aliajn kredojn kiuj malpermesas la plenumadon de militservo, kaj anstataŭigis ĝin per alternativa nacia servo.

La Konvencio ne eksplicite referencas rajton je konscienc-obĵetado, sed la Komitato kredas ke tia rajto povas esti devenigata de la artikolo 18, pro tio ke la devigo uzi mortigan forton povas grave konflikti kun la libereco de konscienco kaj la rajto manifesti sian religion aŭ kredon.

Kiam tiu ĉi rajto estas rekonita per leĝo aŭ praktiko, devos ne esti diferencigo inter la konsciencobĵetantoj baze sur la naturo de iliaj apartaj kredoj ; krome, devos ne esti diskriminacio kontraŭ konscienc-obĵetantoj tial ke ili ne plenumis militservon.

La Komitato invitas la Ŝtatojn partiojn raporti pri la kondiĉoj laŭ kiuj personoj povas esti liberigitaj de militservo baze sur iliaj rajtoj laŭ la artikolo 18, kaj pri la naturo kaj longeco de alternativa nacia servo. □



Desegno sendita de Anton Schaffer (A)

La Eŭropaj Eklezioj (KEK) subtenas konscienc-obĵetadon

"Konscienc-obĵetado kaj paco-servo" estis la temo de renkontiĝo en Minsk en oktobro 1995, organizita de KEK.

(En tiu *Konferenco de Eŭropaj Eklezioj*, fondita en 1959, partoprenas 118 ortodoksaj, anglikanaj, protestantaj kaj malnov-katolikaj eklezioj el ĉiuj eŭropaj landoj. Ĝia ekumena sekretario estas ĉe la *Ekumena Centro* en Ĝenevo.)

Multaj partoprenantoj en tiu renkontiĝo devenis de centr- kaj orient-Eŭropaj landoj, kie okazadas la revizio de la leĝaroj (...)

La partoprenantoj petis *"klarajn kaj justajn procedurojn starigantajn la statuson de konscienc-obĵetado, inkludantajn [la eblecon elekti ĝin por] la personoj miliservantaj kaj la rezervistoj, kaj la liberigon de tiuj kiuj estas enprizonigitaj pro konsciencobĵetado"*. Ili ankaŭ petis *"justajn dispoziciojn por alternativa servo"* kun **sama longeco** da servado kaj nepunaj postenigoj al aliaj laboroj.

Ili petis la ekleziojn *"helpi disvolvi strukturaĵojn por servo de paco, reamikiĝo kaj justeco"*, en kiuj la konsciencobĵetantoj povos plenumi siajn sociajn devojn.

En sia raporto ĉe tiu konferenco, d-ro Stevan Lilic, profesoro pri juro, laboranta kiel volontulo ĉe la *Centro kontraŭ milito* en Beogrado (Serbio), taksis ke ĉ. 300.000 junuloj, ĉefe militservantoj, fuĝis el Serbio kaj Montenegro dum la milito en eksa Jugoslavio.

Esprimante sian subtenon al ĉiuj kiuj rifuzis partopreni en la militoj kiuj nuntempe plagas en Eŭropo, la partoprenantoj alvokis la aliajn ŝtatojn doni sian protekton al *"tiuj kiuj rifuzas la militon"* kaj petas azilon, kaj petis la ekleziojn ke ili partoprenu en la helpo al tiuj personoj (...)

La rezolucio adoptita de la konferenco i.a. diris :
"Ni memoras ke Kristo kaj la apostoloj diris al la kristanoj ke iliaj armiloj ne estas tiuj de la mondo. Ni aprobas ke estis kaj estas kredantoj kiuj rifuzas armile batali, kredante ke ili devas repuŝi la malbonon per la bono."

Rüdiger Noll, sekretario de la KEK-fako por Paco, Justeco kaj Homrajtoj (...) proponis al la eklezioj aktive partopreni en la Programo de la *Ekumena Konsilio de la Eklezioj* por lukti kontraŭ la perforto.

Komunikajo de KEK, 20-10-1995,
el *Eglise et Paix*, vintro 1995, p. 18.

La Serĉado de l'Sankta Gralo :

Origino de la Ronda Tablo

[76,24] « Après cele table fu la Table Reonde par le conseil Merlin, qui ne fu pas establee sanz grant senefiance. Car en ce qu'ele est apelee Table Reonde est entendue la reondece del monde et la circonstance des planetes et des elemenz el firmament ; et es circonstances dou firmament voit len les estoiles et mainte autre chose ; dont len puet dire que en la Table Reonde est li mondes senefiez a droit: Car vos poez veoir que de toutes terres ou chevalerie repere, soit de crestienté ou de paiennie, viennent a la Table Reonde li chevalier.

« Et quant Diex lor en done tel grace qu'il en sont compaignon, il s'en tienent a plus boneuré que s'il avoient tout le monde gaangnié, et bien voit len que il en lessent lor peres et lor meres et lor fames et lor enfanz. De vos meismes avez vos ce veu avenir. Car puis que vos partistes de vostre mere et len vos ot fet compaignon de la Table Reonde, n'eustes vos talent de revenir ça, ainz fustes maintenant surpris de la douçor et de la fraternité qui doit estre entre cels qui en sont compaignon.

« Quant Merlins ot la Table Reonde establee, si dist il que par cels qui en seroient compaignon savroit len la verité dou Saint Graal, dont len ne pot veoir nul signe au tens Merlin. Et len li demanda coment len porroit conoistre cels qui plus vaudroient. Et il respondi :

« *"Trois seront qui l'acheveront : li dui virge et li tierz chastes. Li uns des trois passera son pere autant come li lyons passe le liepart de pooir et de hardement. Cil devra estre tenuz a mestre et a pastre sor toz les autres ; et toz disfoloieront li compaignon de la Table Reonde a quierre le Saint Graal, jusqu'a tant que Nostre Sires l'envoiera entr'aux si soudainement que ce sera merveille."*

« Post tiu [dua] tablo [de l'Sankta Gralo] estis, laŭ la konsilo de Merlin, la Ronda Tablo, kiu ne estis starigata sen granda signifo. Ĉar en tio ke ĝi estas nomita Ronda Tablo, estas komprenata la rondeco de l'mondo kaj la volbo de l'planedoj kaj de l'elementoj ĉe la firmamento ; kaj ĉe la volboj de l'firmamento oni vidas la stelojn kaj multajn aliajn aĵojn ; de tio oni povas diri ke en la Ronda Tablo la mondo estas signita prave. Ĉar vi povas vidi ke el ĉiuj landoj, ĉu de kristanio ĉu de paganio, kie kavaliraro restadas, venas al la Ronda Tablo la kavaliroj.

« Kaj kiam Dio donas al ili tian gracon ke ili estas kompanoj je ĝi, pro tio ili rigardas sin pli feliĉaj ol se ili gajnus la tutan mondon, kaj oni ja vidas ke por ĝi ili forlasas siajn patrojn kaj siajn patrinojn kaj siajn edzinojn kaj siajn infanojn. Pri vi mem vi vidis tion okazi. Ĉar post kiam vi disiĝis de via patrino kaj oni faris vin kompano je l'Ronda Tablo, vi ne havis deziron reveni tien, sed vi estis tuj surprizata de l'dolĉeco kaj de l'frateco kiu devas esti inter tiuj kiuj estas kompanoj je ĝi.

« Kiam Merlin estis stariginta la Rondan Tablon, tiam li diris ke per tiuj kiuj estas kompanoj je ĝi oni ekscios la veron de l'Sankta Gralo, kies neniun signon oni povis vidi en la tempo de Merlin. Kaj oni demandis lin kiel oni povos rekoni tiujn kiuj plej valoras. Kaj li respondis :

« *"Tri estos kiuj finos [la Serĉadon] : la du unuaj, virgaj, kaj la tria, ĉasta. Unu el la tri superos sian patron tiom kiom la liono superas la leopardon pri potenco kaj pri aŭdaco. Tiu devos esti rigardata kiel majstro kaj pastro super ĉiuj aliaj ; kaj la kompanoj je l'Ronda Tablo ĉiuj defalos, en la serĉado de l'Sankta Gralo, ĝis kiam Nia Sinjoro lin sendos inter ilin tiel subite ke tio estos mirindaĵo."*

La Danĝera Seĝo

« Et quant cil oïrent ceste parole, si distrent : *"Ore, Merlin, puis que cil sera si preudons come tu diz, tu devroies fere un propre siege ou nus ne s'aseist fors lui solement, et fust si granz sor toz les autres que chascuns le poïst conoistre."* – *"Si feré je"*, fist Merlins. Et lors fist un siege entre les autres grant et merveilleus. Et quant il ot ce fet, si le comença a besier et dist que ce avoit il fet por l'amor dou Bon Chevalier qui s'i reposeroit.

« Kaj kiam tiuj aŭdis ĉi tiun parolon, ili diris : *"Nu, Merlin, ĉar li estos tiel nobla homo kiel ci diris, ci devus fari propran seĝon kie neniuj sidigu krom nur li, kaj kiu estu tiel granda super ĉiuj aliaj ke ĉiu povu rekoni ĝin."* – *"Tiel mi faros"*, Merlin diris. Kaj tiam li faris seĝon, grandan kaj mirindan inter la aliaj. Kaj kiam li estis ĝin farinta, tiam li ekkisis ĝin kaj diris ke li faris tion pro la amo al la Bona Kavaliro kiu sidos tie.

VII – Percevalo kaj la enermicino (sekvo)

« Et il li distrent maintenant : *"Merlin, que pora il de cest siege avenir ?"*

– *"Certes, fet il, il en avendra encore mainte merveille : car ja mes nus ne s'i aserra qui ne soit morz ou mehaigniez, jusqu'a tant que li Verais Chevaliers s'i aserra."*

– *"En non Dieu, firent il, donc se metroit en trop grant peril qui s'i aserroit ?"*

– *"En peril se metroit il, dist Merlins ; et por les perils qui en avendront avra il a nom li Sieges Perilleux."*

« Kaj ili tuj diris al li : *"Merlin, kio povos okazi el tiu seĝo ?"*

– *"Certe, li diris, el tiu okazos ankoraŭ multaj mirindaĵoj : ĉar neniam iu sidiĝos sur ĝi sen morti aŭ esti vundata, ĝis kiam la Vera Kavaliro sidiĝos sur ĝi."*

– *"En la nomo de Dio, ili diris, do metus sin en grandegan danĝeron tiu kiu sidiĝus sur ĝi ?"*

– *"En danĝeron li sin metus, Merlin diris ; kaj pro la danĝeroj kiuj el ĝi okazos, ĝi havos kiel nomon 'la Danĝera Seĝo'-n."*

Galad simila al Kristo

« Biaux niés, fet la dame, or vos ai dit par quel raison la Table Reonde fu faite, et por quoi li Sieges Perilleux fu fez, ou maint chevalier ont esté mort, qui n'erent pas digne qu'il s'i aseissent. Or vos dirai par quel maniere li Chevaliers vint a cort en armes vermeilles.

« Vos savez bien que Jhesucriz fu entre ses apostres pastres et mestres a la table de la Ceinne ; après fu senefiee par Joseph la Table del Saint Graal, et la Table Reonde par cest chevalier. Nostre Sires promist a ses apostres devant sa Passion que il les vendroit visiter et veoir, et il s'atendirent a ceste promesse triste et esmaïé.

« Dont il avint, le jor de la Pentecoste, que, quant il estoient tuit en une meson et li huis erent clos, que li Sainz Esperiz descendi entr'ax en guise de feu et les reconforta et aseura de ce dont il estoient en doutance. Et lors les fist departir, et les envoia par mi les terres preechier le monde et enseigner la Sainte Evangile. Einsint avint as apostres, le jor de la Pentecoste, que Nostre Sires les vint visiter et reconforter.

« Si m'est avis que en ceste semblance vos vint reconforter li Chevaliers que vos devez tenir a mestre et a pastor. Car tot ausi com Nostre Sires vint en semblance de feu, ausi vint li Chevaliers en armes vermeilles, qui sont de color a feu semblables. Et ausint come li huis de la maison ou li apostre estoient erent clos en la venue de Nostre Seignor, ausi furent les portes dou palés fermees devant ce que li Chevaliers venist. Dont il avint qu'il vint si soudainement entre vos qu'il n'i ot si sage qui seust dont il vint.

« Et le jor meismes fu emprise la Queste dou Saint Graal, qui ja mes ne sera lessiee devant que len en sache la verité, et de la Lance, et por quoi tantes aventures en sont avenues en cest país.

« Bela nevo, la damo daŭrigis, nun mi diris pro kiu kialo la Ronda Tablo estis farata, kaj por kio la Danĝera Seĝo estis farata, kie multaj kavaliroj mortis, kiuj ne estis indaj sidiĝi sur ĝi. Nun mi diros al vi laŭ kia maniero la Kavaliro venis al la kortego en vermiljona armaĵo.

« Vi ja scias ke Jesukristo estis inter siaj apostoloj pastro kaj majstro ĉe la tablo de l'Manĝo ; poste, de Jozef sian signifon ricevis la Tablo de l'Sankta Gralo, kaj de tiu ĉi kavaliro, la Ronda Tablo. Nia Sinjoro promesis al siaj apostoloj, antaŭ sia Pasiono, ke li venos viziti kaj vidi ilin, kaj ili streĉe alkroĉiĝis al lia promeso, malĝojaj kaj timigitaj. Tiam okazis, la tagon de l'Pentekosto, kiam ili ĉiuj estis en domo kaj la pordoj estis fermitaj, ke la Sankta Spirito malsuprevenis inter ilin kiel fajro, kaj ilin rekuraĝigis kaj certigis pri kio ili dubis. Kaj tiam ĝi igis ilin foriri kaj sendis ilin tra la landojn prediki la mondon kaj instrui la Sanktan Evangelion. Tiel okazis al la apostoloj, la tagon de l'Pentekosto, ke Nia Sinjoro venis ilin viziti kaj rekuraĝigi.

« Kaj mi opinias ke kun simila aspekto venis rekuraĝigi vin la Kavaliro kiun vi devas rigardi kiel majstron kaj paŝtiston. Ĉar tutsame kiel Nia Sinjoro venis kun aspekto simila al fajro, same venis la Kavaliro en vermiljona armaĵo, kies koloro estas simila al tiu de l'fajro. Kaj same kiel la pordoj de la domo kie estis la apostoloj, estis fermitaj dum la veno de Nia Sinjoro, same la pordoj de l'palaco estis fermitaj antaŭ ol la Kavaliro venis. Tiam okazis ke li venis tiel subite inter vin, ke ne estis [iu] tiel saĝa ke li sciis de kie li venis. Kaj la tagon mem, estis entreprenata la Serĉado de l'Sankta Gralo, kiu neniam estos forlasita antaŭ ol oni ekscios la veron pri ĝi, kaj pri la Lanco, kaj por kio tiom da aventuroj okazis en ĉi tiu lando.

Konsiloj de la enermicino

« Or vos ai dite la verité dou Chevalier por ce que vos ne vos combattez ja encontre lui, car bien sachiez que vos nel devez mie fere, por ce que vos estes ses freres par la compaignie de la Table Reonde, et por ce que vos n'avriez ja duree encontre lui, car trop est mielres chevaliers de vos. »

– « Dame, fet il, tant m'avez dit que ja mes n'avrai talent de combatre moi a lui. Mes por Dieu enseigniez moi que je porrai fere et coment je le porrai trover. Car, se je a compaignon l'avoie, je ne me partiroie ja mes de lui tant come je le poisse sivre. »

– « De ce, fet ele, vos conseillearai je au mienz que je porrai (...) ; [79,11] et lors, quant vos l'avroiz trové, si tenez sa compaignie au plus que vos porrez (...) [79,17] Si vos en alez droit au chastel de Corbenyc, ou li Rois Mehaigniez maint. Et ilec sai je bien que vos en orroiz veraies noveles, s'il avient que vos la nel truissiez. »

Einsi parlerent dou Chevalier entre Perceval et la recluse, tant qu'il fu hore de midi. Et lors dist ele a Perceval :

– « Biaux nierz, vos remaindroiz anuit mes o moi, si en serai plus aise. Car il a si lonc tens que je ne vos vi mes que mout me sera grief la vostre departie. »

– « Dame, fet il, je ai tant a fere que a peines porroie je hui mes remanoir : si vos pri por Dieu que vos m'en lessiez aler. »

– « Certes, fait ele, par mon congié ne vos en iroiz hui mes. Mes demain, si tost come vos avroiz oïe messe, vos donrai je volentiers congié. »

Et il dist que donques remandra il. Si se fist tantost desarmer ; et cil de laienz mistrent la table, si mengierent de ce que la dame avoit fet apareillier. (...)

[80,19] Et mout le chastia sa tante et amonesta de bien fere. Mes sor toutes choses li pria ele que il gardast sa char si netement come il le devoit fere, et il li creanta que si feroit il. Et quant il orent grant piece parlé dou Chevalier et de la cort le roi Artus, si li demanda Perceval (...) :

[81,4] « Mes or me dites que vostre filz Dyabiaus devint : car je desir mout a savoir coment il le fet. »

– « Certes, fet ele, il ala servir le roi Pellés vostre parent por avoir armes ; et puis ai je oï dire qu'il l'a fet chevalier. Mes il a ja passé deus anz que je nel vi ; ainz vet sivant les tornoiemenz parmi la Grant Bretagne. Si quit que vos le troveroiz a Corbenyc, se vos i alez. »

– « Certes, fet il, se je n'i aloie fors por lui veoir, si iré ge, car molt desir a fere li compaignie. »

– « Par Dieu, fet ele, je voldroie molt qu'il vos eust trové, car lors seroie je aise se vos estiez ensemble. »

Einsi demora Perceval avec s'antain (...) ; et l'endemain, si tost com il ot messe oïe et il fu armez, s'en parti de laienz et chevaucha tout le jor parmi la forest, qui ert grant a merveille, en tel maniere qu'il n'i encontra home ne fame.

« Nun mi diris al vi la veron pri la Kavaliro por ke vi ne plu batalu kontraŭ li, ĉar ja sciu ke vi devas ne fari tion pro tio ke vi estas liaj fratoj per la kompanio je l'Ronda Tablo, kaj pro tio ke vi tuj ne rezistus kontraŭ li ĉar li estas multe pli bona kavaliro ol vi. »

– « Damo, li respondis, tiom vi diris al mi ke neniam havos deziron batali mi kontraŭ li. Sed pro Dio instruu al mi kion mi povos fari kaj kiel mi povos trovi lin. Ĉar, se mi havus lin kiel kompanon, mi neniam disiĝus de li kiom mi povus sekvi lin. »

– « Pri tio, ŝi diris, mi konsilos vin tiel bone kiel mi povos (...) ; kaj kiam vi trovos lin, tenu lian kompanion tiom kiom vi povos (...) Iru rekte al la kastelo Korbenik, kie la Kripla Reĝo restadas. Kaj tie mi ja scias ke vi havos verajn novaĵojn pri li, se okazos ke vi ne trovos lin tie. »

Tiel Percevalo kaj la enermicino kune interparolis pri la Kavaliro, tiom ke estis la hore de tagmezo. Kaj tiam ŝi diris al Percevalo :

– « Bela nevo, vi restos plu ĉi-nokte kun mi, tiel mi estos pli kontenta. Ĉar pasis tiom longa tempo dum kiu mi ne plu vidis vin, ke tre malĝojiga estos via foriro. »

– « Damo, li diris, mi havas tiom por fari ke apenaŭ mi povos plu resti hodiaŭ : tial mi petas vin pro Dio, ke vi lasu min iri. »

– « Certe, ŝi diris, kun mia permeso vi ne plu foriros hodiaŭ. Sed morgaŭ, tuj post kiam vi estos aŭdinta meson, mi volonte donos al vi forpermeson. »

Kaj li diris ke li do restos. Tiam li tuj lasis igi demeti lian armaĵon ; kaj la tieuloj metis la tablon, kaj ili manĝis (iom da) kion la damo igis prepari. (...)

Kaj ŝia onklino lin multe instruis kaj admonis ke li bone agu. Sed super ĉio ŝi petis lin ke li gardus sian korpon tiel "pure"* kiel li devas, kaj li promesis al ŝi ke li tiel faros. Kaj post kiam ili parolis longan pecon [da tempo] pri la Kavaliro kaj pri la kortego de l'reĝo Artus, tiam Percevalo demandis al ŝi (...) :

« Sed nun diru al mi kio via filo Djabiaŭ fariĝis : ĉar mi multe deziras ekscii kiel li fartas. »

– « Certe, ŝi diris, li iris servi la reĝon Pelle, vian parencon, por ricevi siajn armilojn ; kaj poste mi aŭdis diri ke tiu ĉi faris lin kavaliro. Sed pasis jam du jaroj dum kiuj mi ne vidis lin ; ĝis nun li iradas, sekvante la turnirojn tra la Granda Britonio. Tial mi kredas ke vi trovos lin en Korbenik, se vi iros tien. »

– « Certe mi iros, li diris, eĉ se mi irus nur por lin vidi, ĉar mi multe deziras havi kompanion kun li. »

– « Pro Dio, ŝi diris, mi multe volus ke li estu vin trovinta, ĉar tiam mi estus kontenta se vi estus kune. »


Tiel Percevalo restis kun sia onklino (...) ; kaj la morgaŭon, tuj post kiam li aŭdis meson kaj estis enarmaĵigita, li foriris de tie kaj rajdis dum la tuta tago tra la arbaro, kiu estis mirinde granda, laŭ tia maniero ke li ne renkontis viron nek virinon. □

* T.e. ĉaste.

Estimataj Legantoj

La fama Rashi de TROJES klarigis pri la paĝo Ĥulin 137A en la Babilona Talmudo: Ĉiu profetaĵo [estas donata nur] laŭ la bezonoj de la tempo kaj de la generacio, kaj laŭ la esenco de la afero.

Ekzistas laŭ la SIVRONA "horizonto" nur tri ĉefaj sciencoj en la mondo, aŭ nomu ilin homaranaj branĉoj se vi volus (kvankam nature ampleksante la tutan aron de nuntempaj subbranĉoj). Unu rilatiĝas al la vivado, la dua al nia orientado kaj la tria al la "spirita" pensado (ĉar ĉu ne ĉia cerbuma aktivado estas spirita afero?



Box 23180 ת"ד
IL-91231 Jerusalem

Fakte tiu estas iomete alia divido de la aferoj ol la kutima, sed analizante kaj etikede la aferojn, la ecojn kaj erojn de nia ekzistado, estas la komenco de ĉia kompreno. La unua branĉo estas la EKONOMIAJ sciencoj, do ĉiuj aferoj ligitaj al nia spirado, mangado kaj cetera vivado kaj produktado. La dua branĉo estas la GEOGRAFIAJ sciencoj. Iomete surprize ankaŭ Historio apartenas al tiuj geografiaj sciencoj laŭ tiu difino ĉar temas pri nia orientiĝo en la universo, kaj vere, preskaŭ ĉia historio estas ja ligita al sia geografio, ĝis ni komencas paroli pri pli pura historio de la "ideoj" kaj aliaj, eble iomete, pli profundaj temoj. La lasta branĉo estas la LITERATURAJ sciencoj kaj inkluzivas la pure spiritajn aspektojn de la homa ekzistado, religio kaj ĉia mistiko, kaj entute la maniero penseme cerbumi, ĉu racie, ĉu medite, ĉu intuicie aŭ eĉ empatie.

Nature oni trovas multajn interbranĉoj sed tiuj tri estas la ĉefdivido por fruktodona analizo, ĉar estante la plej simpla ĝi plej taŭgas. Cetere ĉia analizo devige suferas de tiu sama problemo de interbranĉoj. Rezume nia divido estas funda kaj simpla, triope ligita al la TEKNIKO (ekonomio), al la NATURO (geografio) kaj al la PENSADO (literaturo). *Jeremi*

מרכז סברון
CENTRO SIVRON
مرکز سقرون

Klarigo pri EZRA (Association de Chronologie et d'Histoire dans l'Optique de la Tradition Juive).

En Novembro 1995 estis fondita kronologian asocion en Jerusalemo kun la celo esplori la judajn kronologion kaj historion laŭ tiuj judaj historiaj fontoj kiuj havas vere pruvitan historian validecon, kaj por plublikigi la rezulton de tiu kompara kronologio, kaj krome organizi ekspoziciojn kaj konferencojn, ĉio kun aparta atento pri la juna kreskanta israela generacio.

Tiu organizo EZRA portas la nomon de ĝia fondinto Paul Rotsztein, kies hebrea nomo estas ĝuste Ezra. Jam dum tridek jaroj li daŭre publikigas multajn eldonojn de kronologiaj grafikaj tabuloj pri la historio de Israelo. Ekzemple la "Grafiko de la Historio" kiu jam aperis en hebrea, franca, angla kaj rusa eldonoj. Eĉ esperanta eldono ekzistas kaj estas tute preta, sed ĝi bezonos iun sufiĉan kontribuon por ebligi grandkvantan presadon kaj tiel fine aperi en la mondo.

La rezultoj atingitaj estas kelkfoje tre surprizaj kaj la leganto miru pri tiom da nekonataj aspektoj kiujn la juda historio klare montras, komparita kun la ĝenerale plej konata mondhistorio. Jen kelkaj rimarkindaj faktoj pri la juda historio.


- La riĉeco de la juda historio ege frapas pro ĝia fenomenala longeco kaj pro ĝia elstara sorto.
- La daŭra unueco kaj unikeco de la juda popolo.
- La nedankemo de la "filinaj religioj" al la judismo estas tro okulfrapa.
- La ekstrema subtakso de la juda diasporo, far la kristana doktrino.
- La ekzisto de juda literaturo, kulturo kaj saĝeco treege ampleksa kaj profunda.
- La troa okultigado de la juda historio kaj saĝeco, far la aliaj popoloj.
- La preteco kiu movigis la popolojn adopti ĉion kio estas juda, sen pro tio laŭdi aŭ rekoni la judecan fonton.

EZRA — P.O.B. 16135, JERUSALEM 91161 (ISRAEL)

Ni ne rajtas forgesi ke la Israela popolo antaŭas per 1300 jaroj la aperon de la kristanismo. La judismo sekve ŝuldas nenion al la kristanismo kaj atendas nenion de ĝi.

- La necezo korekti la kronologion de la hebreoj en Egiptujo. Iel estas supozata ke periodo de ĉirkaŭ 1500 jaroj produktis nenian arkeologian pruvon aŭ restaĵon. Nur la kompara studo de la arkeologiaj eltrovoj kaj la judaj fontoj - speciale la Talmudon, tiun kaluminatan verkegon, povos elkonduki la historian sciencon el tiu sakstrato kiun ĝi eniris.

Jen kelkvorta rezumo pri la ĉefaj rezultoj al kiuj alvenis EZRA post siaj fervoraj esploroj pri la dieca projekto nomita: Historio - limigita al 6000 jaroj.



Fine (?) pri *Amikaro Bruno Gröning*

Respondo al Z.M. Sikosek

Estimata, kun atento mi legis kaj relegis viajn kritikajn notojn pri Bruno Gröning.

Mi ne konas detale lian vivon sed havis la honoron partopreni kvin fojojn en la amikaj rondoj de la asocio ; dum la lasta mi atestis pri resaniĝo, kiun mia kuracisto ne komprenis. Via maniero prezenti la asocion ŝajnas al mi tro malsimila al mia sperto, por ke mi plene fidu ankaŭ al via prezentado de la koncernata biografio. Mi preferas tamen pro manko da informoj, kontentiĝi per rimarkoj banalaj por mi, sed eble ne por vi :

1/En ĉiu iom originala grupo socia, ekzemple judoj, komunistoj, framasonoj, katolikoj, esperantistoj, amikoj de Bruno Gröning aŭ membroj de iu ajn sekto, ekzistas pli malpli fortaj tendencoj al mem-idealigo de la grupo, sekve al "regula partopreno" kaj korelativo al "malligiĝo kun la mondo" kaj "perdo de jam ekzistantaj sociaj rilatoj" aŭ pli ĝenerale pli malpli granda evito rilatiĝi kun homoj eksteraj al la grupo.

2/Ekstere de ĉiu grupo tia, ekzistas tendenco timi la grupon, rifuzi serioze informiĝi pri ĝi, kaj prefero simple kalumnii ĝin vole nevole. Ni, esperanto-parolantoj, tre bone spertis tiun duan tendencon al kiu, mi opinias, vi ne sufiĉe rezistis, kaj ankaŭ la "*katolika episkopa oficejo en Essen*", koncerne la amikaron Bruno Gröning.

Al ĝi mi ŝuldas pli grandan kaj efikan konfidon al la naturaj fortoj resanigaj. Al la UEA-komitato mi konsilas daŭrigi la kunlaboradon kun ĝi.

Cetere ni ĉiuj evitu enfermiĝi en iu ajn grupo aŭ konsideri ĝin kiel la sola savanto.

Kvankam mi ne konas vin, mi deziras al vi vivon sanan, pacan, kreivan kaj feliĉan.

François Degoul (08-02-97)

Kolombo, 23 mar 1997.

Kara samideano,

La artikolo pri "Bruno Gröning" tre interesis min, ĉar nenion mi sciis pri lia frua vivo. Tamen, laŭ la raportoj, eĉ nun malsanuloj ricevas "sanigon" per Bruno Gröning. Tamen, ni devas kompreni la aferon sen antaŭjuĝo. Jam tra la mondo kelkaj homoj pretendas posedi potencon resanigi malsanulojn. Preskaŭ ĉiuj el ili pensas ke ili estas nur iloj de alia potenco, aŭ de Dio, Jesuo Kristo, aŭ kuracisto en la spiritalaj mondoj. Kelkaj sanigantoj apartenas al iu kristana eklezio ; ekzemple, en la pentekosta eklezio oni trovas multajn sanigantojn (sanigantaj evangeliistoj).

La sinteno al ĉi tiuj sanigantoj ne estas la sama ĉu en la eklezio aŭ ekstere. Ankaŭ en kelkaj landoj leĝoj ekzistas kontraŭ sanigantoj ; ekzemple en Kebekio (Kanado), la spirita saniganto Monique Peries*, al kiu oni ne permesas meti siajn manojn sur malsanulojn, alivorte tuŝi pacientojn ...sed ŝi rajtas meti siajn manojn *super* la pacientojn : stranga leĝo !

En la tiel-nomita juda-kristana tradicio, kutime estas legi en la malnova testamento pri sanigo de malsanuloj ; kaj en la nova testamento ni renkontiĝas kun la plej granda saniganto en la historio : Sinjoro Jesuo Kristo.

Laŭ la 4 evangelioj Jesuo faris minimume 30 specojn de sanigoj. Tamen, aliaj homaj problemoj restis neŝanĝitaj : malriĉeco, senhejmeco, malfortecoj de maljuneco. Laŭ S-a Mateo 26,11, Jesuo diris "ĉar la malriĉulojn vi ĉiam havas..." Do ĉu Jesuo akceptis tian situacion kiel neŝanĝeblan ?

Mi certe estas dankema al S-ro Z. M. Sikosek pro lia artikolo.

Ronald C. Peries

* Mi deziras plian informon pri ĉi tiu saniganto.

Konklude : *La tri kribriloj*

Iam iu venis viziti Sokraton, kaj diris al li :

– Aŭskultu, Sokrato, mi devas rakonti al ci kiel cia amiko kondukis.

– Haltu ! interrompis la saĝa homo. Ĉu ci pasigis cian dirotaĵon tra la tri kribriloj ?

– Tri kribriloj ? diris la alia, plena de miro.

– Jes, mia bona amiko : tri kribriloj. Ni ekzamenu ĉu cia dirotaĵo povas pasi tra la tri kribriloj. La unua estas tiu de la vereco : ĉu ci kontrolis ĉu ĉion kion ci volas rakonti al mi estas vera ?

– Ne, mi aŭdis rakonti ĝin kaj...

– Bone, bone. Sed certe ci pasigis ĝin tra la dua kribrilo ? Tiu ĉi estas tiu de la boneco : ĉu kion ci volas rakonti al mi, se tio ne estas tute vera, estas almenaŭ io bona ?

Hezitante la alia respondis :

– Ne, tio ne estas io bona, male...

– Nu ! diris la Saĝulo, ni provu uzi la trian kribrilon, kaj ni vidu ĉu utile estas rakonti al mi kion ci deziras diri al mi...

– Utile ? Ne precize...

– Do ! diris Sokrato ridetante, se cia dirotaĵo estas nek vera nek bona nek utila, mi preferas ne ekscii ĝin, kaj al ci mi konsilas ĝin forgesi...

(Greka apologo*)

* Transdonita de (ankoraŭ ne esperantista) amikino Corinne (de Irazein, F), bedaŭrinde sen referencoj.

Atesto pri alispeca resaniĝo

Habana, 20/4/97

Karaj,

Bonvolu akcepti mian leteron kaj laŭeble respondi ĝin, ĉar mi bezonas aŭskulti vian opinion rilate okazintaĵon spertitan de mi. (...)

Dum tri monatoj akra ventrodoloro turmentadis min. Kapturinoj, malforteco de la kruroj kaj aliaj simptomoj pensigis min pri grava malsano sed, malgraŭ ĉio, mi ne kuraĝis viziti hospitalon ĉar mi timis aŭskulti voĉe de la kuracisto la nomon de la malsano min alfalanta. Subite mi ek-malkovris la **aperon de sango** en la necesejo, kaj pelita de malespero kuris al hospitalo.

Post kelkaj esploroj, kirurgo malkovris ene de mia rektumo **ion kreskiĝantan** kaj sendis min al alia specialisto, ke tiu ankaŭ konstatu la aferon. Sed mi, jam tute senesperiginta, forlasis la hospitalon. Multaj miaj konatuloj konsilis al mi **viziti faman sorĉiston** kiu onidire scipovas per sorĉado eĉ mortigi homojn. Mi rifuzis la sugeston de miaj konatuloj, asertante ke mi **preferas Dian baton ol diablan kison**. (Kubanoj kuras al sorĉistoj ĉiam kiam iu aŭ io kontraŭas ilin).

Plorante, mi longe preĝis ĝis kiam pro troa laciĝo miaj okuloj fermiĝis. **Tiam du homoj eniris** mian dormoĉambron kaj mi prenis ilin por ŝtelistoj. Unu el la du homoj prenis min ĉe la manradikoj kaj iom tiris min al si. Sensukcese mi ekbaraktis sed miaj elĉerpiĝintaj fortoj malebligis al mi ĉian movon. Per lastaj fortoj mi demandis al ili kiuj ili estas, kaj tiam la viro min tenanta seke respondis "*mi estas Johano*", poste skuis min, kaj **mi sentis kvazaŭ mi mortas**. Sed tuj sekve mi vekiĝis, ellitiĝis kaj komencis lavi miajn vestaĵojn.

Io stranga pri la afero estas ke en la unuaj momentoj, la nomo Johano ne pensigis min pri io rilatanta al la Biblio sed, laŭmezure kiel la minutoj pasis, mi malkovris ke la ventrodoloro malaperas, kio certigis min ke la homoj min vizitintaj ensonĝe resanigis min.

Tuj mi prenis mian Biblion kaj pensante ke la homo qui resanigis min estas neniu alia ol Johano la Baptisto, mi legis ĉion pri Li. Kun elreviĝo mi venis al la konkludo ke nenio pri lia vivo certigas min ke estis li kiu vizitis min.

Poste mi eklegis la evangelion laŭ Sankta Johano kaj je la fino de la legado **apenaŭ mi ne svenis legante la jenon** : "Pedro, sin turninte, vidis malantaŭe la disĉiplon kiun Jesuo amis (...)" Pedro do, vidinte lin, diris al Jesuo : "*Sinjoro, kaj*

kion pri ĉi tiu ?" Jesuo diris al li : "*Se mi volas ke li restu ĝis mi venos, kio estas al vi ? Vi sekvu min*". Mi devas klarigi ke post tio mi ne plu vidis sangon en la necesejo.

Karaj, mi ne scias kion vi opinias pri tio, sed mi ne povas ne pensi ke Jesuo restigis Johanon ĉe ni, alie kiel mi povas klarigi mian tujan resaniĝon ? Nun mi atendas vian malkaŝan opinion.

(...) [Cetere] **Mi estas kristano kiu adaptiĝas al neniun eklezion**, ĉar en ilies [tiele] instruoj ĉiam mi trovas ion kio ne kongruas kun mia komprenpovo rilate la Sanktan Skribon.

Atestantoj de Jehovo, interalie proklamas ke Jesuo estis krucumata ne al du-ligna kruco sed al unu sola vertikala lignaĵo. Tio konfuzigas min ĉar la evangelio laŭ Sankta Johano 20,25 tekstas : "*Se mi ne vidas en liaj manoj la truon de la najloj...*" Do, laŭ tio kion mi komprenas, Sankta Tomaso asertas ke oni uzis du najlojn por alnajligi la manojn de la Sinjoro al la kruco ; kaj tio kompreneble pensigas min pri duligna kruco ĉar por krucumi homon al unu sola ligna kruco oni bezonus uzi nur unu najlon por fiksi ties manojn al la ligno.

Evangeliiistoj proklamas la triunuon certa malgraŭ ke malmultaj el ili sukcesas klarigi ĝin, kaj **mi demandas** al mi : se la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito estas unu korpa tutaĵo, kial Jesuo diris : "*Sed pri tiu tago kaj la horo scias neniu, eĉ ne la anĝeloj de la ĉielo nek la Filo, sed la Patro sola*" ?

Al kiu parolis Jesuo kiam en la lastaj momentoj li diris : "*Mia Dio, mia Dio, kial vi forlasis min*" ? Ĉio pensigas min ke Jesuo sidas dekstre de la Patro, sed ne ene de la Patro. En Marko 16, 17-18, Jesuo sciigas pri la signoj kiuj sekvos la kredantojn, kaj vere dirite, evangeliiistoj bele pravigas sin per tiuj signoj.

Alia eklezio proklamas la sabaton sankta dum Jesuo asertas ke la sabato estas por la homo kaj ne la homo por la sabato.

Katolikoj plenigas siajn preĝejojn per gispaj pupoj, kaj surgenuiĝas antaŭ ili eĉ dum en la Biblio Dio forte kondamnas tiujn kiuj tiel agas.

Karaj, multaj aliaj strangaĵoj izoligas min disde ĉiaj eklezioj, des pli ĉar **mi rifuzas partopreni la luktadon kiu inter ili estiĝas** por akapari al si multe pli da kredantoj, forgesante ke Jesuo asertis ke regno dividita detruigas. (...)

Tutkore salutas vin

Argelio

(A. Guadarrama Corrales, Calle N 11109 ^E/ 3^{ra} y E, Apto 6-C, Altahabana Boyeros, Habana 10800 Cuba)

Taŭhid : la Unueco kaj

Sekvo de *Asistilo* n-ro ...13 ! Responde al daŭrig-peto de J. Bertrand (nome de katolika esperantista grupo kiu studis la komencon de tiu teksto*), jen la memstara fino de prelego de turka islamano, organizita de usonana neesperantista *Interuniversitata Kristana Amikaro* en februaro 1992, ĉe *Madison-Universitato* en Viskonsino ; (kaj ricevita per la "interreto").

Ni konsideru du punktojn :

Unue la homaj menso, parol- kaj aŭd-kapabloj estas malgrandaj kaj limigitaj ; homo do povas plenumi nur unu agon samtempe. Kaj (...) la grado de liaj streboj estas proporcia al lia celo kaj la aferoj kiujn li pritraktas (...)

Due ĉiam, kiam homo provas kompreni ion, li emas serĉi ties principojn kaj similaĵojn en si mem ; kaj se li ne povas trovi ilin [tiamaniere], li emas serĉi similaĵojn en sia ĉirkaŭaĵo aŭ en sia (homa) medio.

Tia proceduro, aplikebla al kontingencaj estaĵoj, malsukcesas kiam ĝi estas uzata por kompreni la Necese Ekzistantan Kreinton, Kiu ne similas al ia kreita, kontingenta estaĵo. Ĉi-kaze tia proceduro fariĝas misgvida.

Neniel la Kreinto, la Posedanto de la Gloro, povas esti pripensata konsiderante tiujn du punktojn, tial ke estas nenio limo al Lia Povo (male de la kreitaĵoj). Liaj Povo, Scio, kaj Volo estas ĉio-ampleksantaj, universalaj, kaj ne povas esti limigitaj (...) Tial, kompari la Necese Ekzistantan Kreinton kun la kontingencaĵoj estas neracie.

Pro tio, la jenaj grupoj estis erarigataj : la naturalistoj kredis ke la kaŭzoj havas la povon krei siajn efikojn ; la *Mu'tazila*-skolo [ĉefe VIII-a/XII-a jc p.K.] opiniis ke la bestoj kreas siajn memvolajn agojn ; filozofoj opiniis ke la Scio kaj Volo de Allah ne penetras la malgrandaĵojn [pro tio ke "malgrava kaj malgranda tasko ne povas esti konfidata al grava homo, ĉar li ne konsentus malleviĝi por tion fari"]; kaj la fajro-kultantoj kredis ke la kreado de la malbono estas farita de alia dio.

Kristanoj ankaŭ faras tiun eraron pensi ke la Atributoj de Ĉiopova Dio estas kiel la homaj atributoj, kaj komparas ilin. Ili donas la atributojn de la Necese Ekzistanta Kreinto al kreita, dependa, kontingenta, kaj limigita estaĵo [Jesuo]. Per tio ili faras malmodaj la instruojn kaj la altan statuson de Jesuo mem (la Tute Sankta) kiel potenca mesaĝiston de Allah.

La vero estas forta, travidebla kaj pura tia kia ĝi staras ; ĝi estas jam bela tia kia ĝi estas : ĉia provo troigi aŭ plibeligi ĝin malfortigas kaj vuas ĝin.

Demando

Se iu en konfuzo demandas : " (...) Ni ne kapblas imagi la ekziston el stato de absoluta nenio, kaj neniigon el stato de ekzisto"¹.

Respondo. Ho vi ! Via malfacilaĵo kaj konfuzo pri tio estas la imaga rezulto de erariga analogio. Tio estas : vi komparas unuflanke la *ikad* (kreado el nenio) kaj *ibda* (kreado per kunmetado) de Allah kun aliflanke la homaj produktadoj. Tamen la manoj de iu "servisto"² povas nek neniigi nek krei [eĉ] partiklon (...) Jes, tiu analogio estas tre erariga kaj la homa menso ne povas facile malimplikiĝi el ĝi.

Homo neniam vidis forton aŭ povon de iu kreitaĵo tia ke ĝi kreas ion el nenio kaj neniigas ion (...) Tial li rigardas la materion supozante kreinton kun povo tia kia li imagas ĝin. Ekzakte ĉi tie li faras la eraron : ĉar la speco de povoj kiujn li imagas estas la limigitaj povoj de la kontingencaĵoj havantaj nenian rolon en la kreado krom situi en kunmetaĵoj. Dum ni devas rigardi [la artaĵojn de Allah] laŭ la Necesa Ekzisto kaj de la vidpunkto de la Absoluta Povo. Tio bezonas ekzemplojn.

La ekzemplo de la monto

Malfacile estas movi monton. Jes.

Jes se vi provas uzi [nur] viajn manojn. Sed se vi havas apogpunkton, tiam vi povas meti monton dekstren kaj alian maldekstren³. Do puŝo tiel malforta kiel [la pezo de] nukso movas la montojn tutfacile. Koncepte ĉesis la pezo de la monto (...)

Ekzemplo de elektro kaj lumo

Ŝajne solidaĵo estas nepenetrebla. Jes.

Jes se vi volas materie ĝin penetri. Sed se vi estas elektro en solida kupraĵo, aŭ lumo en solida vitro ? Koncepte aĵoj estas iel rigidaj kaj estas tute obeemaj aliel. Tiel la tuta materio, ĉia kontingencaĵo, aŭ kio ajn en la universo – materio, fajro aŭ lumo – estas obeemaj al la Leĝoj de la Kreitaro. Ili ne estas rezistemaj [al tiuj leĝoj], nek estas ia karaktero en ili por rezisti (...)

* Vidu lian leteron en n-ro 19, p. 29 ; kaj la unuajn partojn en n-roj 11, p. 23, kaj 12, p. 27 & 29.

Unikeco de la Kreinto (fino)

Kion Islamanoj kredas pri Jesuo (la Tute Sankta)

La islamanoj kredas ke Jesuo (la Tute Sankta) estis potenca mesaĝisto de Allah.

Ni kredas lian miraklan naskiĝon per la Permeso de Allah, lian paroladon kiel infano per la Permeso de Allah, lian revivigon de mortinto per la Permeso de Allah, lian sanigon de leprulo per la Permeso de Allah. Ni kredas ke li ne instruis ian falsan kulton, kaj ke li ricevis la Evangelion. Ni gloras lin kaj lian patrinon, kaj vere sekvas lin.

Ĉion ĉi ni kredas sen ia enmiksiĝo aŭ premo de la Kristanoj. La Tute Saĝa Korano inkludigis tiujn ĉi [krederojn] en la "pilierojn" de Islamo. Neniu islamano estas islamano krom se li rekonas tiujn ĉi faktojn. Tamen la Korano igas nin rifuzi kian ajn asociadon de kunuloj kun Allah. Estas dirite en ĝi :

" Ili diras : 'La Donema prenis al Si filon'.

Vere vi plenumis hontindaĵon !

Preskaŭ disrompiĝis la ĉieloj pro tio, kaj fendigis la tero, kaj disfalis la montoj en rubaĵon,

ĉar ili atribuis filon al la Donema,

kvankam ne konvenas al la Donema preni al Si filon. " (19, 89-93)

Fakte estas neniu revelaciita nek logika indiko ke Jesuo – aŭ kiu ajn homo rilate tion ĉi – estis fariĝonta generita filo de Dio.

Allah diras en la Korano :

" Diras la Judoj ke Uzajr⁴ estas la filo de Allah kaj la Kristanoj diras ke la Mesio estas la filo de Allah. Tia estas la vorto de iliaj buŝoj. Ili imitas la vorton de tiuj kiuj miskredis antaŭe." (9,30)

Mesaĝisto de Allah neniam pretendis esti dia. La originalaj Skriboj⁵ kaj la Korano rifuzas tiajn pretendojn. Kaj ni ne havas ian kialon kredi ke Dio ŝanĝas Siajn planojn, aŭ bezonas oferon por pardoni. Eĉ plu, multe pli arbitre estas diri ke tia ofero devas esti tiu de Lia tiel nomita generita filo. Tia skemo implicas mankon, dependecon kaj limon en la Volo kaj Atributoj de Dio.

La doktrino pri origina peko, generita filo kaj elaĉetado de la pekoj pere de la krucumado kaj resurekto estas senfondaj pretendoj kaj ne povas konsistigi bazon por la celo de la kreado. Tia doktrino ne estas en la instruoj de Jesuo (TS), ĝi estas la instruo de la Eklezio, imagita de aliaj homoj jarcentojn post li, speciale de Paŭlo – la memnomumita apostolo. Tiu ĉi tuta skemo disfalas, ĝi estas nekohera.

Unuflanke ĉiu homo estas destinita por torturo en infero pro atribuita peko kiun li/ŝi neniam faris, aliflanke li/ŝi ricevas elaĉetadon per la suferigo kaj mortigo de aliulo ! Fakte estas multaj evidentaj pruvoj eĉ en la hodiaŭa Biblio, kiuj neniigas la doktrinon. Mi povos montri ilin al vi se vi petos⁶.

La atributoj de Allah

Kiel oni devas kompreni la manifestiĝojn de la Nomoj kaj Atributoj de Allah ? Mi multfoje diris ke la Unika, Plej Pura, Ĉiopova Allah, Kies atributoj estas absolutaj kaj Kies funkcioj universale manifestiĝas, estas for trans la materio kaj korporeco, senfine for de kia ajn limo, kaj ne ligita de la malfacileco de denseco kaj multeco. Kiel oni devus kompreni Liajn atributojn ?

Jen ekzemplo : Kvankam la suno estas ununura estaĵo, pere de ĝia lumeco ĝi ĉeestas ĉe ĉiu brila objekto. Potenca leĝo de vero estas demonstrita per tiu ĉi komparo kiu asertas ke la lumo kaj lumeco ne povas esti limigataj : por ili longa distanco kaj proksimeco estas samaj, multe kaj malmulte estas egalaj (...) Dum ĝi ĉeestas ĉie per sia lumo, per si mem la suno ĉeestas nenie [sur la tero].

Se la suno, kiu estas materia, malgrandega, senanima spegulo de la manifestiĝo de la atributo Lumo (*Al-Nur*)⁷, povas montri universalan aktivecon en vasta spaco dum ĝi estas ununura estaĵo, ĉu la Glora Ĉiopova Allah ne povus fari ege nenombreblajn agojn samtempe en ĉiu loko ?

Kia estaĵo, kiu estas mem manifestiĝo de Liaj atributoj, povas esti kaŝita for de Lia Unikeco, Lia Volo, Lia Absoluta Povo kaj Lia Ĉioampleksa Scio ? Kia tasko povas esti malfacila por Li ? Kia loko povas esti kaŝita por Li ? Kia aĵo povas resti for de Li ? Kia individuo povas altiri proksimen de Li sen Lia Volo ? Ĉu io entute povas esti kaŝita for de Li ? Ĉu ia materio entute povas esti obstaklo al alia ? Ĉu ia loko povas esti malplena de Lia ĉeesto ? Ĉu ĉiuj estaĵoj ne estas vigle obeemaj al Liaj ordonoj kaj leĝoj, kiel la elektro en metalaj dratoj kaj la lumo en travideblaj objektoj estas facile bonvenigitaj ?

" Allah kreas kion Li volas : kiam Li ion dekretas Li nur diras al ĝi : 'Estu !' kaj ĝi estas." (3,48)

Ĉu la objektoj kaj manifestiĝoj ne fariĝas vanaj kontraŭ Lia Aranĝo de Aferoj ? Ĉu la kaŭzoj kaj perantoj ne fariĝas ŝajnaj vualoj por Lia Gloro kaj Alteco ? (Lia Gloro kaj Alteco postulas kaŭzojn kiel vualojn por Lia Pura Honoro kaj Eminenteco, dum Lia Unueco kaj Unikeco postulas kompletan submetadon al Li nuliganta la kaŭzojn kaj naturon.)

Dum Li ĉeestas nenie, ĉu Li ne ĉeestas ĉie per siaj atributoj ? Ĉu entute Li povas esti lokita, en loko aŭ tempo ? Ĉu la distanco, malgrandeco kaj koporeco povas esti obstakloj al Liaj proksimeco, povo kaj volo ?

Ĉio signas la eternan belecon de Allah

Ĉiuj perfektoj en la tuta universo estas signoj kaj indikoj al la Vera Perfekteco de Glorulo. La tuta bono, perfekto kaj belo en la universo estas nur pala ombro rilate Lian Veran Perfektecon. Ili estas nur speguloj montrantaj la manifestiĝojn de Liaj Nomoj. Tial, Islamano esprimas sian miron kaj amon al bela floro dirante : *"Kiel bela kaj mirinda ĝi estas farita, kiel saĝe ĝi estas ornamita"*.

Tion dirante li rekonas la Gloran Farinton, por Kies Absoluta Povo krei ununuran floron estas same facile kiel krei la Paradizon. Islamano vidas la belon en la floro kiel palan spegulon de la manifestiĝo de la Nomo *La Absoluta Belo*, kaj tiel vidas ĝin kiel ricevanton de belo, ne kiel ties fonton. Sed samtempe li klare scias ke la grado de ricevita belo ne estas komparebla kun tiu de la fonto.

Evidente estas ke donaco fontas de riĉaĵoj, afablaĵo venas el iu kiu estas afabla, kaj kio lumigas devas esti luma. Ĉar estas tiel, la fakto ke tiu ĉi tuta ĉarmo, beleco kaj perfekteco estas donita al la universo montras la ekziston de la Eterna Belulo.

Ĉiuj aĵoj pasas sur la tero kiel potenca rivero scintilanta kun lumaj briloj. Sammaniere kiel rivero scintilas kun manifestiĝoj de la suno, ankaŭ la fluo de la estaĵoj portempe scintilas kun briloj de ĉarmo, belo kaj sencoplenaj devoj, kaj poste ili foriras, malaperas. Kaj tiuj kiuj venas post ili daŭrigas kaj montras la saman scintilon kaj belon.

Oni povas kompreni dank'al tio, ke la manifestiĝoj kaj ekzemploj de beleco sur la bobeloj de fluinta rivero ne estas de si mem. Pli ĝuste ili estas manifestiĝoj de belo venanta de la lumo de suno. Kaj tiel ankaŭ la kvalitoj kaj perfektoj kiuj mallonge scintilas sur la fluo de la universo estas la brilo de belo venanta de la Eterna Beleco de Allah.

Dankon.

"Estas neniuj dioj krom Allah ;

Li estas Unu, Li ne havas kunulon."

Muhammad Kahraman

1/ Komparu kun jena aforismo, atribuita al la franca kemiisto **Antoine Laurent Lavoisier** (1743-1794) : *"Rien ne se perd, rien ne se crée, tout se transforme"*. ("Nenio neniĝas, nenio kreiĝas, ĉio transformiĝas.")

2/ Subkomprenite "de Dio" ; t.e. homo, ĉar ĉiuj homoj, konscie aŭ nekonscie, vole aŭ nevole, estas tiaj.

3/ Komparu kun la frazo atribuita al la fama greka fizikisto **Arkimedo**, kiu elpensis la uzon de la levil-stango en la III-a jc a.K. : *"Donu al mi apogpunkton kaj mi levos la mondon"*. (Daŭrigo de la notoj) ➤

Taksado de Esperanto fare de islama filozofo

Esperanto estas spirita lingvo devenanta de spirita intuicio, la lingvo de la Animo, sed kiu restas mistero kiam ni rigardas al niaj piedoj kaj al la tero.

Eĉ kiam oni profunde spekulativas pri la vorto Esperanto, oni malkovras ke la eterna estonto troviĝas tute proksima de tie kien la estaĵo direktas siajn ideojn, kaj tiam oni levas la demandon : *"en kiu lingvo ni pensas ?"*

Oni povas respondi ke tio estas per la lingvo de la Materio, kaj tial ĉi oni ankoraŭ ne povis malkovri nian veron laŭ la plena senco de la termino ; kaj eĉ kiam oni parolos Esperanton en ĉiuj regionoj de la terglobo, restos la granda finenda tasko kiu konsistas en la amo al la Kreinto en tuta sincero.

Ĉiuj nacioj de nia erao uzas plurajn lingvojn kaj tio kaŭzas grandan disigon inter ili. Sed ek de nun la Ĝahilija-epoko* aperas kaj la Mondo, sekve de sensaco de vakuo, sentas la nepran bezonon de monda lingvo kun, kiel bazo, spirita Esperanto...

El *L'Unité humaine* (La homa unueco), eldonita de *L'Alliance Universelle*. Ĉar la aŭtoro estas alĝeriano ni publikigas nek lian nomon nek lian adreson sed pretas transsendi al li eventualajn leterojn.

* "Nescio" (de dia revelacio) : kutime, nomo de la araba antaŭislama epoko. (Noto de la tradukinto)

Komparaj religistudoj

Antwerpen (B) – Maŝad (Irano)

La antverpena FVG (Fakultato por komparaj religisciencoj) kaj la teologia sekcio de la Ferdaŭsi-universitato en la sankta islama urbo Maŝad faris unuan inter-konsenton pri plia kunlaborado (16-1-1997). La konsenton skribe konfirmis la FUM-dekano, *Hojatol-Islam Abdolkarim*, kaj la FVG-prezidanto, rabeno *Jeremy Rosen*. FVG jam ricevis multegon da libroj (pers- kaj arab-lingvaj) el Irano.

Lydia Kerremans

➔ (Daŭrigo de la notoj :)

4/ Temas pri Ezra : *"Laŭ la komentistoj, tiun homon Dio igis morti, kaj resurektigis post cent jaroj. 'Uzajr resurektinta recitis al la judoj la tutan Pentateŭkon, kiun li parkere sciis antaŭ ol morti ; kio igis la judojn diri ke, por tion fari, li devis esti filo de Dio.'" (Noto de M. Kasimirski en sia franca traduko de la Korano.)*

5/ Ĉar la islamanoj opinias ke la nunaj Evangelioj kaj tuta Biblio estas parte falsigitaj.

6/ Vidu la [anglalingvan] videokasedon *"Ĉu Jesuo estas Dio ?"* de Ahmed Deedat. (Noto de la aŭtoro)

7/ "Allah estas la lumo [an-Nûr] de la ĉieloj kaj de la tero." (24,36)

Nuntempaj spiritaĵoj

"Mi estas la Eternulo" (Genezo 15,7 ktp)

Ĉu ĉiu frazo Biblia aŭ Korana estas laŭtleĝinda ?

La respondo necesigas objektivajn kaj subjektivajn konsiderojn.

Objektive dirite, iuj frazoj sonas tiel bele, tiel lume, ke ilia laŭtleĝado estas dezirinda :
"Amu vian proksimulon kiel vin mem" (Levidoj 18,18) ; "Loĝos lupu kun ŝafido" (Jesaia 12,6) ;
"Al tiu kiu pentos kaj pliboniĝos, vere Allah turnos sin" (Korano 5,40) ktp.

Tamen la beleco kaj laŭtleĝindeco de multaj paĝoj ankaŭ dependas de la leganto, eĉ de la momento kiam li legas.

Fine ni konfesu ke en la tiel dirita "Dia Parolo" ne mankas naŭzaj eroj : senfinaj ritajoj aŭ krim-rakontoj en la Biblio, alvokoj al sankta milito, aŭ iom naive krudaj pentraĵoj pri infero kaj paradizo en la Korano...

Tial, se vi sentas ke io en la "Dia Parolo" pli esprimas la homan malbonecon ol la Dia bonecon, ne laŭtleĝu ĝin. Se vi dubas, kio ofte okazas al mi, la kutimo legi kaj relegi iom post iom fajnigos vian intuicion. Sed **prefere ni prononcu sanktigaĵojn**, mi kunmete diru "Di-bildigaĵojn", tio estas aĵojn kiuj redonemas al ni la bildon de Dio donitan al la homo (laŭ Genezo 1,27) kaj iom post iom perditan post la peko de Adamo.

Tial, kvankam la plej evidenta pensmaniero distingas homon kaj Dion, valoras prononco de frazoj kiel "Mi estas la Eternulo", oftega en la Biblio, aŭ, en la Korano, de la pronomo "Ni" por signi Allahon. Per tiaj prononcadoj ni fariĝas **kvazaŭaj profetoj**, homoj kies buŝo esprimas kvazaŭan parolon el la Dia Buŝo. Tiel agis la malnovtestamentaj profetoj ; ankaŭ Mahometo. Tiel agis Jesuo, dirante "Mi estas la vojo kaj la vivo kaj la vero" (Johano 14,6). Tiel agis komence de la X-a jc p.K. la islama mistikulo Al-Hallâĝ, mortkondamnita i.a. pro tio ke dum ekstazo li diris "Mi estas la vero", konforme al sia idealo de homa Diigo¹.

La eldiro de frazoj kiel "mi estas la Eternulo" en publikaj cirkonstancoj almenaŭ dufoje okazigis mortkondamnojn ; ĉar Dio "ne deziras la morton de mortanto" (Jehzekel 18,31) ne donu al malicaj homoj la ideon ke ili plaĉus al Dio oferante vian vivon buĉe. Tamen "eniru vian ĉambreton" kaj tie "preĝu al via Patro, kiu estas en sekreto". Se vi sekvas tiun konsilon (de Mateo 6,6) la sola risko, per eldirado de la nomo Dia, estas ke tiu eldirado iom post iom re-Di-igus vin ĝis grado tia ke vi ne plu kapablu ĝin kaŝi. Tiam, estu pli singardema ol Jesuo kaj Hallâĝ : ne ĉagrenu Tiun kiu "ne deziras la morton de mortanto". Nur **amu vian proksimulon kiel vin mem**. Helpu lin re-Diigi kiel vi mem. Al li, kiu pentos kaj pliboniĝos, vere Allah turnos sin. Dank'al li, dank'al vi, ĉiuj re-Di-bildiĝos ; ankaŭ bestoj : *loĝos lupu kun ŝafido*.

(Sekvote)

François Degoul,
entuziasma laŭtleĝanto

1/ Vidu *Encyclopaedia Universalis* (en la franca), art. "Halladj".

(Pagita anonco)

(Interŝanĝaj anoncoj)

LA JAPANA BUDHANO
N-ro 294 MARTO - APLIRO 1997

ENHAVO

卷頭言	石黒 漢子	1
Nudaj Piedoj de l Lumo(1)	Talpo	2
改定PIV 仏教術語提案	西 泰弘	16
観音経 Stro pri Avarokiteŝvara	出谷 根庵	24
Enkonduko al Pali lingvo (4)	Izutani Kon'an	27
96年度会計報告	只石智津子	28
目次, El Redakcio		29

目次

LA KANCERKLINIKO
Politika, Kultura, Skandalema, Ajnista

"La mondo ŝanceliĝas
Nia Kliniko plu staras"

5 n-roj jare - 115 FF
(specimeno kontraŭ 3 LRK.)

Direktoro/Redaktoro : J. LE PUIL
"Les Cocherats" F-18210 THAUMIERS
(pĉk Paris 12 729 73 X (aŭ UEA kllk-g))

La Kosmologio de Martinus

Logika vivklarigo kiu kondukas al pozitiva vivsinteno - kaj al pacaj kaj harmoniaj rilatoj inter homoj. Legu pri la kosmologio en la nova revuo KOSMOS.

Petu senkoston provekzempleron ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 Kopenhago F, Danio. ☎ +45 3834 6280 - Fakso +45 3834 6180

Nenia unuigo aŭ membreco

4-a Interreligia Seminario Esperantista en Jerusalemo : 20-a ĝis 26-a de aprilo 1998

Temo : "La geografia dimensio de la religia universo".

Jen resume **bonaj kialoj** por tiu tempo kaj loko :

- En 1998 samtage okazos la juda Pesah, la katolika kaj protestanta Pasko, kaj la *Ajd-al-Adha* (aŭ "Granda Oferfestoj" : *Ajd-al-Kebir*) de la islamanoj ; dum kutime ne kongruas sunaj kaj lunaj jaroj.
- La printempo estas klimato la plej agrabila tempo en Israelo kaj certe la plej bela ĉar ĉiuj kampoj estas verdaj kaj multaj floroj floras.
- Israel festos dum tiu jaro sian 50-jaran jubileon, kaj estos multe da eventoj. (La jubileo okazos la 30-an de aprilo, tuj post la postkongresa ekskurso.) Do, ankoraŭ plia bona kialo viziti Israelon.
- Eble ĝi parte estos ankaŭ laborkunveno por prepari kontribuon dum eventuala Universala Kongreso en Jerusalemo en la jaro 2000.

Provizora programo (pliriĉigota per viaj proponoj de prelegoj kaj aliaj kulturaj kontribuoj).

- Dimanĉe 19 (Lingvopreparo por Jeruslemano) ; alvenoj ; bonvena kaj interkonatiĝa vespero.
 - Lunde 20 Prelegoj : "La jerusalema alfabeto (alfabet-komparo)", de J. Gishron ; "La ĉefaj fontoj por la juda kronologio", de Paul Rotsztein ; "La Talmudo kaj la Biblio pri mondlingvo", de J. Gishron.
 - Marde 21 Ĉeftemo : "La signifo de Jerusalemo por la abrahamidaj religioj" (enkonduko : J. Gishron).
 - Merkrede 22 "La Vorto-Dio : kiel ortodokse kaj mistike kompreni religion", de J. Gishron ; "Kio okazis dum la Unua Tago : ĉu kreado de la Mondo aŭ de la Homo ?", de P. Rotsztein.
 - Ĵaŭde 23 "La du mondaj dimensioj (kaj la spirita)" de J. Gishron ; "La problemoj kun la egipta kronologio", de P. Rotsztein.
 - Vendrede 24 "Hilelismo aŭ Akivaismo : kiaj estis la infanaj revoj de Zamenhof", de J. Gishron.
- Vespere : Sabatmanĝado ĉe iu familio.
- Sabate 25 Ĉefa pieda rondirado en la Sankta Urbo.
 - Dimanĉe 26 Tutaga ekskurso en la Sankta Lando, ĝis Galileo kaj la lago Genesaret (Kineret) kaj reveno al Neve Šalom.

(**Postkongreso** :)

- Lunde/marde : Kroma dutaga ekskurso.
- Merkrede/vendrede : Daŭrigo de la diskutoj en Neve Šalom ; kaj preparo de agendo por la UK 2000.

La seminariaj prelegoj kaj diskutoj plej probable okazos en hotelo (*Davidka*, aŭ *Sefanja*). Ĉiutage okazos mallongaj promenadoj en Jerusalemo. Eblos partopreni en la ĉefaj kristanaj diservoj.

Aliĝilo, al J. Gishron, Box 231 80, IL-91231 Jerusalemo. Tel. : +972-2-586 62 49. Faks. : +972-2-587 05 27.

☆ **Aliĝo**. Antaŭ 31-10-97 : 100 US\$ ☐ ; Antaŭ 31-12-97 : 120 \$ ☐ ; Poste : 140 \$ ☐.

☆ Tutaga **ekskurso** : kromaj 30 \$ ☐.

☆ **Tranoktadoj** (Provizoraj prezoj* en \$, kun antaŭpago de 30 %) : – normalaj : 35 (x 7 =) 245 ☐

– Malmultekostaj en la orienta parto de Jerusalemo : 12 (x 7 =) 84 ☐

– Iom pli luksaj en normala hotelo tute apuda : 45 (x 7 =) 315 ☐

* Ankaŭ dependas ĉu vi deziras ĉambron : unulitan ☐ ; dulitan ☐ ; plurlitan ☐.

☆ **Postkongreso** :

– Dutaga ekskurso : 95 \$ ☐ (inkluzive la tranoktadon, eble sub tendo) ;

– Tranoktado en Neve Šalom ☐ (ankoraŭ ne fiksita).

Pri la **manĝoj** ni aranĝos malmultekostan solvon.

NOMO :

Antaŭnomo :

Adreso :

Poŝtkodo :

Urbo :

Lando :

Tel. :

Faks. :

Mi antaŭpagas : 100 \$ ☐ ; 120 \$ ☐

Dato :

Subskribo :